

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



2010

7

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2010. №7 (189)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2010

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara Ondo.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2010.

"La Ondo de Esperanto" (Волна эсперанто). 2010, №7 (189).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 21 июня 2010 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Vortoj de Komitatano Z.

Ĉu io koviĝas sub la surfaco?

La elektoj en UEA estas teda temo, ĉar apenaŭ eblas skribi ion, kio ne estis dirita antaŭ tri jaroj kaj eĉ pli frue. En majo la elektokomisiono publikigis sian proponon pri la nova estraro.

Ne tute sensurpriza estas tiu listo. Vere neatendita estis nur la ellaso de la vigla ĉiliano José Vergara, kies lokon pri sciencaj kaj fakaj aferoj akaparitis Amri Wandel. La israelano estas jam reciklaĵo kiel estrarano, ĉar li komencos sian trian periodon. Lia dubinda merito estas, ke li neniam sukcesis reelektiĝi senpaŭze, kvankam malmultaj movadpolitikistoj same verve sin ofertadas al videblaj postenoj. Latinamerikanojn reprezentos la kubano Maritza Gutierrez, kiu transprenos la lokon de la japano Hori Yasuo, elektita en Jokohamo por anstataŭi la ĉinon Yu Tao, kiu estis elektita en Pekino. La estraraneco pri landa agado fariĝis kurioza stafetaĵo de movadestroj el la landoj, kie okazas la elektojara UK. Same kiel Wandel, ankaŭ Gutierrez estas revenanto el pli frua estraro. Estas kvazaŭ UEA adoptus la anemian kutimon de REU rotaciigi en sia estraro samajn nomojn, ĝuste kiam REU ŝajnas ekrezigni pri ĝi.

Nova UEA-estrarano estos nur Stefano Keller. Pro sia nekonateco la svisa hungaro ne vekas apartajn sentojn. Ni lasu lin surprizi pozitive, sed cetere ni povas nur ĝemi de elreviĝo kaj miri, ke inter 6000 membroj de UEA oni ne trovis pli da freŝaj vizaĝoj. La silento, kiu ekregis en la komitata retlisto pri la propono, estas komprenebla, kvankam ekster la supera organo iuj akre kritikis ĝiajn membrojn pri tiu senvorteco. Decis tamen honteme silenti, ĉar la komisiono kuiris sian proponon el la ingrediencoj, kiujn donis al ĝi la komitato. Nur la komitatoj rajtas proponi estraranojn. Certe ankaŭ la komisiono devus serĉi kandidatojn, sed la komitatoj malhavas moralan rajton akuzi ĝin pri pasiveco, se ili dividas saman kulpon. Pinton de hipokriteco atingis Edvige Ackermann, kiu skoldis la komisionon pri diktado, ĉar ĝi ne proponis alternativajn kandidatojn, precipe por la prezidanteco. La laŭta damo antaŭe membris en du elektokomisionoj kaj povis atendi la saman respondon al siaj krioj, kiun ŝi mem siatempe donis: malgraŭ persistaj penoj la komisiono ne trovis pli da kandidatoj.

La malkontentuloj ĉesu plendi kaj venontfoje aktiviĝu sufiĉe frue por proponi kandidatojn, kiujn ili ŝatas. Reĝimoj ne iniciatas revolucion. La sukceso de la estraranoj en la elekto de komitatoj B tamen igas pensi, ke la malkontento ne havas vastan bazon. Mirindas cetere, ke ne multaj atentis la malvenkon de eŭropanoj en la balotado: Barbara Pietrzak sola sukcesis apud kvin alimondanoj. Finfine nur eŭropanoj grumbas pri aferoj en UEA, sed la estonto eble apartenas al aliaj. Alimondanoj povas havi aliajn pensojn kaj pacience atendi, ĝis la asocio falos en iliajn manojn. Nu, de la dua teamo de Dasgupta ni apenaŭ povas esperi pli ol donis la unua, sed ni ekatendu la jaron 2013. La CO almenaŭ zorgos pri la domo, dum io interesa eble koviĝos sub la surfaco.

Komitatano Z

Sur la kovrilo estas foto el la pafista festo en la Esperanto-urbo Herzberg, pri kiu Małgosia Komarnicka rakontas en la 13a paĝo.

12 opinioj pri la kongresa sezono

Ĉi-foje la temo de nia *Ronda Tablo* estas la “kongresa sezono”, dum kiu, inter la somera (vide el Eŭropo) solstico kaj la aŭtuna ekvinokso, okazas multaj esperantistaj renkontiĝoj, interalie, la Universala Kongreso. Dek du aktivuloj, ricevintaj nian inviton, respondis al la tri demandoj:

1. Kion vi atendas de ĉi-jara kongresa sezono?
2. Kiu(j)n kongres-sezona(j)n aranĝo(j)n vi planas partopreni? Kial?
3. Kion vi opinias pri la nuna stato kaj estonteco de la Universala Kongreso, kiu restas la plej granda esperantista kunveno?

Probal Dasgupta Barato Prezidanto de UEA

1. Mi atendas revenon al la normala labora ritmo post la aparte historio-grafia emfazo de niaj jubileaj aranĝoj.

2. Mi evidente partoprenos la Universalan Kongreson en Kubo. Mi bezonas respondi la demandon *kial* ne rilate al la UK, sed rilate la nepartoprenon en aliaj aranĝoj: temas pri la devo ĉi-jare verki plurajn ampleksajn tekstojn en kaj pri Esperanto.

3. La Universalaj Kongresoj aktuale plenumas tradiciajn bezonojn. Iuj partoprenantoj havas pri tiuj kongresoj suplementajn aŭ alternativajn atendojn — laŭ ili pli konformajn al la nun sentataj bezonoj. La atendoj estas sufiĉe diversspecaj, kaj ne povas ĉiuj esti samtempe plenumataj. Sed mi bonvenigas la debaton, kiu furoras.



Jakvo Schram Belgio Prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT

1. Kion oni povas atendi de la kongresa sezono, krom ke la organizantoj de kongresoj bone laboru por prezenti al la partoprenantoj programon laŭ la ideoj de la asocio aŭ klubo por kiuj ili organizas la kongreson.

2. Mi jam partoprenis la SAT-Amikaran kongreson en Hillion, kiu estis mirinde bone organizita. La Beneluksan Kongreson, al kiu mi povis modeste kunlabori, kaj pri kio mi poste aŭdis multajn favorajn kritikojn. Dum la Skotlanda Esperanto-Kongreso, mi estis la gastpreleganto, kaj mi spertis plej amikan etoson en regiono kiu estas mirinde bela. Perfekta ekvilibro inter turismaĵoj kaj debatoj. Restas al mi ĉi-jare nur la SAT-kongreso en Braŝovo, kie krom la jarkunsido de SAT, la partoprenantoj povas gustumi riĉan turisman aranĝon.

3. Ĝis nun mi partoprenis nur unu UKon en Roterdamo. Ne estante membro de UEA, mi preferas ne kritiki la kongreson. Tamen mi esperas ke estonte mi aŭdos pli da Esperanto kaj malpli da krokodilado... Plej verŝajne UK instigas la partoprenantojn al pli profunda lernado de la lingvo universala, precipe parole.



Peter Baláž Slovakio

Kunordiganto de E@I, estrarano de EEU, eldonisto (www.espero.sk)

1. Ĉi-jare mi atendas post pluraj jaroj iom da ripozo de la Esperanto-aranĝoj. Tamen min (kaj aliajn ene de E@I kaj SKEJ-teamoj) atendas komence de julio organizado de SES 2010 — Somera Esperanto-Studado, kun la renkontiĝo de la *lernu-uzantoj*. Kaj pro la granda kvanto de aliĝintoj (jam 190 de 33 landoj) ĝi estos certe interesa kaj riĉa aranĝo, eĉ se iom laciga por organizantoj.

2. Krom SES 2010 ĉi-somere mi verŝajne ripozos ekster Esperanto-aranĝoj kaj laboros pri diversaj novaj projektoj de E@I. Krome ni pretigas por novembro aranĝon KAEST (www.ikso.net/kaest). Post la somero, komence de septembro mi estos la inform-budon de EEU en la Ekonomia Forumo en Krynica. Kaj partopreno en Arkones dependos de plej diversaj aferoj.

3. Laŭ mi UKoj devus pli malfermiĝi — kaj al pli vasta Esperanto-publiko (ĉefe per malplikostigo, por ke aranĝoj vere estu plurmilaj, eĉ se ne nepre en luksaj ejoj), kaj al ekstera publiko (“malferma tago” dum ili). El tiu vidpunkto Bjalistoko estis bonega ekzemplo, indus sekvi tian organizadon. Oni ne bezonas luksegajn hotelojn, multe pli ĝojus “ordinaraj” esperantistoj pri akceptebla prezo, kiu ebligus renkontiĝon de 4–5 mil esperantistoj. Tiel paradokse eblus eĉ gajni finance; se venos pli da homoj, kiuj pagas malpli, rezulto povas esti finance pozitiva.



José Antonio Vergara Ĉilio

Estrarano de UEA pri faka kaj scienca agado

1. Ateston ke Esperanto daŭre kunigas homojn, dum la onidiroj pri ĝia forpaso estis troigaj; utilon por plivigli la movadon; renovigajn iniciatojn.

2. La UKon, i.a. pro mia respondeco kiel estrarano en la periodo 2007–2010, kaj tial ke mi prelegos IKU-e.

3. La UK restas nemalhavebla pinta evento de Esperantujo. Mi tamen diru ke estus bone zorge pripensi kaj decide enkonduki gravajn reformojn, por ke ĝi skue liberigu sin de la rutinaj ŝablonaĵoj kaj fariĝu vere aktiva laborforumo de la Esperanto-movado. Ĝi estas vere impresa renkontiĝo de “homoj kun homoj”, sed aparte de homoj... kiuj povas pagi la kotizon, flugadon, loĝadon, ktp. Belus ke la fizika renkontiĝo invitus homojn el plej diversaj lokoj al neĉeesta partopreno, per utiligo de Skajpo, ktp. Estus bone establi Lingvan Festivalon kiel konstantan programeron de nia migranta UK, al kiu la kongresanoj mem kontribuas. Tiel ĝi allogus la lokajn lingvemulojn, kaj konkrete pruvus ke ni sincere celebras la lingvan diversecon.



Giorgio Silfer

Eŭropo

Verkisto, instruisto kaj organiza konsilisto, nuna Konsulo de la Esperanta Civito



1. Ĝi devus doni respondojn pri la efektiva kapablo mobilizi sian merkato(niĉ)on en almenaŭ tri kazoj. Unue, kiom UEA-TEJO-ILEI kapablas venigi al la tri kubaj kongresoj. Due, kiom la francaj kulturcentroj (Greziljono kaj La Kvinpetalo) kapablas ankoraŭ elteni. Trie, ĉu la SAT-kongresoj nerenverseble sinkas.

2. Mi planis iri al Kaiserlautern pro *Heroldo de Esperanto*, sed ne havis tempon.

3. La sorto de UKoj estas pli kaj pli intime kaj ekskluzive ligita al la sorto de UEA. Tio ne estas bona por UKoj, evidente. Sed ankaŭ ne por UEA, ĉar UKoj efikas al la membraro pli malfidelige ol fidelege.

Svetlana Smetanina

Ruslando

Vicprezidanto de REU



1. Iujn gravajn ŝanĝojn mi ne atendas, ĉar nialanda esperantistaro ne partoprenas la UKon en Kubo pro ĝia malproksimo kaj multekosto.

2. Mi kaj miaj geamikoj, samideanoj, samklubanoj kaj simpatiantoj entreprenos Eŭropan vojaĝon kun partopreno de la Itala nacia kongreso unue, por viziti novajn allogajn lokojn, ekzemple, la sudan Francion, Andoron, Hispanion; due, por sperti la organizadon de nacia kongreso en Italio.

3. UKoj estas bonaj, sed tute oni ne atentis novajn esperantistojn, kiuj, bedaŭrinde, post UK-partopreno malaperas.

Josef Ŝemer

Israelo

Sekretario de Esperanto-Ligo en Israelo



1. Krom la kutimaj atendoj — multaj partoprenantoj kaj enhavo riĉa kaj kontribua por nia lingvo kaj movado — mi aldonus ion plian: ke la UKon kaj la aliajn kunvenojn partoprenu tiuj novaj esperantistoj, kiuj lernis pere de la Interreto sed ĝis nun ne havis kontakton kun la movado. Tiuj memlernintoj grandparte “perdiĝas”. Se la organizantoj de niaj internaciaj kunvenoj sukcesos altiri multajn el ili (kiu maniere? bona demando!), tio estos granda atingiĝo.

2. Ĉar mi vivas for de Eŭropo, la “koro” de Esperantujo, mi “kontentiĝos” per la du eventoj okazontaj en Kubo: la UK kaj ILEI-konferenco. Mi ege ŝatus partopreni ankaŭ la prestiĝan kulturen kunvenon ARKONES en Pollando, sed bedaŭrinde tio ne okazos...

3. Mi persone tre multe ĝuas la UKojn kaj ĉiam revenas hejmen kun “reŝargitaj baterioj”. Sed mi samtempe konfesas, ke mi ne vidas grandan progreson atendatan de la plej granda E-evento: ne okazis en la UKoj de la 21a jarcento iu granda revolucio. Krom kelkaj bonaj ŝanĝetoj en la enhavo, la skeleto restis sama kaj la ĉielon UEA intertempe ne sukcesis faligi, eĉ ne ete, malgraŭ ke la mondo multe ŝanĝiĝis.

Hori Jasuo

Japanio

Eksprezidanto de KAEM, eldonisto



Mi respondas nur la du lastajn demandojn.

2. En Japanio okazas ĉiun jaron Japana E-Kongreso kaj kelkaj regionaj kongresoj. Jam en majo kaj junio okazis kvar regionaj kongresoj. Mi estis respondeculo pri Kantoo-Kongreso, kies teritorio estas Tokio kaj la ĉirkaŭaj ses gubernioj. En la venonta semajno mi partoprenos en la 6a Azia Kongreso en Mongolio kaj poste en la UK en Kubo. Fine de aŭgusto mi partoprenos en Nordorienta-Ĉina Kongreso en la urbo Dandong.

Kiam mi komencis lerni Esperanton diligente kaj serioze, mi promesis al mi kvar aferojn, kaj unu el ili estas partopreni laŭeble ofte en E-aranĝoj. Mi estas maljuna kaj ne povas agadi multe, sed eĉ tia jam velkanta arbo povas gajigi la kongresan arbaron per la partopreno. Por ebligi multajn partoprenojn, mi ŝparas monon kaj tenas min sana. Renkonti amikojn en tiuj kongresoj donas al mi pli da energio.

3. Ĝenerale mi estas kontenta pri la UKoj, sed por adapti nin pli bone al la situacio, ni bezonas pli da diskutoj pri la enhavo de UKoj. En la lastajara kongreso partoprenis ege malpli da homoj ol mi antaŭvidis. Kial tiom malmulte en la jubilea kongreso? Povas esti, ke io okazas en la Esperantomondo. Ni devus analizi la situacion pli detale.

Claude Nourmont

Luksemburgio

Vicprezidanto de UEA (kulturo, kongresoj, edukado)



1. Persono, mi esperas kombini iom da feriado kun multe da laboro...

Ĝenerale, mi esperas ke kongresado en Kubo stimulos la movadon en la lando mem kaj en la najbaraj landoj. Bonege estas, ke multaj kongresoj kaj malpli grandaj aranĝoj okazas en aliaj partoj de la mondo, kiel la Azia en Mongolio, donante eblecon al Esperanto-parolantoj ĝui interesajn programojn kaj vivi Esperantujon en multaj lokoj.

2. La UKon, evidente kaj neeviteble, estante estrarano de UEA. Kaj ankaŭ la postkongreson en Kubo por pli bone konatiĝi kun la kongresa lando. BET-46: mi ŝatas la regionon, la etoson, kaj mi esperas partopreni la kunvenon de TEĴA. Kaj ankaŭ aranĝojn en Kvinpetalo, i.a. la koncerton de *Kajto*.

3. Facila demando, malfacila respondo! Universalaj Kongresoj estas sukcesaj aranĝoj en sia nuna formo, kaj mi ŝatas ilin (se mi ne ŝatus, mi ne partoprenus jam 44 UKojn). Sed mi ankaŭ konscias, ke iaj ŝanĝoj necesas. Ĉu ŝanĝi la strukturon, ĉu organizi ĝin alimaniere, ĉu pli malfermi ĝin, ĉu okazigi ĝin malpli ofte (favore al pli da kontinentaj kunsidoj), ĉu eblas trovi novan manieron ĝin financi? Mi klopodas imagi, kiel ni faris en iuj laborgrupoj, kiel povus disvolviĝi estontaj ĉefrenkontiĝoj de la Esperanto-movado, sed pri tio vi devus fari alian intervjuon.

Se vi partoprenis interesan kongreson aŭ renkontiĝon, ne forgesu tuj post ĝi skribi artikol(et)on por *La Ondo*.

Li Jianhua

Ĉinio

Redaktoro de reta *El Popola Ĉinio*, komitatano de Pekina Esperanto-Asocio

Mi plej atendas de ĉi-jara UK, ke la raportoj faritaj en la Internacia Kongresa Universitato estos publikigitaj, ĉar ĉiujare multaj ĉinoj sin anoncis por prelegi en tiu universitato, sed neniu sukcesis. Mi volas lerni de la raportoj kaj ĉerpi sperton. En 2004 mi laboris kiel volontulo de la 89a UK en Pekino kiam mi ankoraŭ estis studento de la Ĉina Komunika Universitato, en kiu oni kulturis esperantistojn-studentojn. Mi ŝatas la atmosferon de Esperantujo kiel granda familio. Krome, ĉi-jara UK okazos en Kubo, tio estas tre malfacila laŭ mia opinio. Mi opinias, ke la nuna Esperanto-movado estas pli kaj pli vigla. Plimultiĝo de junaj esperantistoj kaj disvolvo de UK estas la du bonaj atestoj.




Lu Wunsch-Rolshoven

Germanio

Gvidanto de EsperantoLand

Miaj respondoj estas iom personaj, ĉar mi mem organizas du somerajn renkontiĝojn — la 8an SOMERE kaj la 1an Internacian Kongreson de EsperantoLand en Strasburgo. Do mi ĉefe esperas, ke ili ambaŭ sukcesos bone kaj plaĉos al la partoprenantoj. Poste mi ĝuos feriojn, sed en septembro mi eble partoprenos en Arkonas; ĉiam interesa renkontiĝo kun poloj kaj aliaj orienteŭropanoj.



Mi ne povas bone juĝi pri la aktualaj UKoj, ĉar mi ne plu partoprenis ekde 2001. Mi sentis mankon de zorga kaj vasta traktado de Esperanto-temoj. Krome, UKoj estas jam tre grandaj. Do laŭ mi venis la tempo establi plian internacian kongreson, kiu vere estos kongreso pri Esperanto, ĝia komunumo kaj disvastigo — kun kultura kaj turisma programo, kompreneble.

Humphrey Tonkin

Usono

Eksprezidanto de UEA

Mi partoprenos la UKon ĉi-jare — unu el la malmultaj usonaj esperantistoj, kiujn oni permesas iri tien, pro la ĝenerala malpermeso al usonaj civitanoj viziti Kubon (absurda politiko en la nuntempa monda situacio). Temos pri malgranda kongreso, kun relative nereprezenta partopreno.



La malfacilaĵoj, kiujn multaj homoj spertas, pri ĉeesto de kongresoj (precipe pro kostoj kaj distancoj) diktas, ke ni ŝanĝu nian metodon administrati UEA kaj enkonduki pli aktivan utiligon de la reto. Iuj homoj rezistas tion, preferante la privilegian kaj esence eŭropocentran sistemon, kiun ni nun uzas. Tiuj samaj homoj foje plendas, ke la vojaĝkostoj de eksterŭropaj estraranoj estas tro grandaj por nia asocio — tiel plifortigante la eŭropocentran influon. Mi esperas, ke tio ŝanĝiĝos. Por ke asocio estu universala, ne sufiĉas nomi ĝin tia!

Mi ankaŭ serĉas vojon por ĉeesti la italan kongreson, pro lanĉo de la itala traduko de mia redakto de *Modernaj Robinzonoj*, la unua esperantlingva libro de Tivadar Soros.

UEA: Mark Fettes, la plej populara komitatano B

La 1an de junio 2010 okazis en la Centra Oficejo de UEA la nombrado de la voĉoj donitaj en la elektado de ses Komitatanoj B por la periodo 2010–2013. Por tiu tasko la Estraro de UEA nomumis komisionon, kiu konsistis el la Ĝenerala Direktoro Osmo Buller kaj la individuaj membroj Rob Moerbeek, Piet Schuil, Francisco Veuthey kaj Atie van Zeist.

Balotilo estis sendita al 4801 individuaj membroj, el kiuj voĉdonis 1550, t.e. 32,3%. Estis 1527 validaj kaj 23 malvalidaj balotiloj. La balot-aktiveco klare superis tiun de la antaŭa fojo en 2004, kiam 29,0% de la membroj voĉdonis, sed ĝi ne atingis la rekordon de 33,6% en 1998.

Plej multe da voĉoj, 1010, ricevis **Mark Fettes**. La aliaj kvin sukcesaj kandidatoj estis **Probal Dasgupta** (973), **Barbara Pietrzak** (876), **Amri Wandel** (820), **José Antonio Vergara** (816) kaj **Wu Guojiang** (732).

Ne elektitaj estis Petr Chrdle (653), Jukka Pietiläinen (613), Marija Belošević (529), Tomasz Chmielik (491), Paulo Branco (443), Josip Pleadin (309) kaj Johan Derks (282).

La Komitatanoj B reprezentas en la supera organo de UEA la individuajn membrojn. Por ĉiu komencita milo da membroj estas unu Komitatano B. Krome ĉiu landa kaj faka asocio, aliĝinta al UEA, rajtas nomumi Komitatanon A, se ĝi havas pli ol 100 membrojn. Fine la Komitatanoj A kaj B rajtas alekti Komitatanon C, kies nombro ne rajtas esti pli ol la kvarono de tiu de la Komitatanoj A kaj B.

GK UEA

La Elekta Komisiono proponas senalternativan liston

Ni aperigas la finan parton el la konkluda raporto de la Elekta Komisiono de UEA (Renato Corsetti, Lucille Harmon, Ileana Schröder), kiu proponis al la Komitato de UEA elekti en Havano kandidatojn el nur unu elekto-listo senalternativa.

1. Komitatanoj C: Paulo Branco, Jean Codjo, Probal Dasgupta, Marcel Delforge, Loes Demmendaal, Mark Fettes, Josep Franquesa Solé, Stefano Keller, Barbara Pietrzak, Amri Wandel.

Ĉi tiu listo estas definitivigebla nur tuj antaŭ la Kongreso, ĉar en kelkaj okazoj la elekto povus montriĝi nebezona, se la koncerna kandidato jam iĝis komitatano B, dum aliaj povus aldoniĝi se kelkaj el la kandidatoj por la estraro ne plu estus komitatanoj A.

2. Estraranoj: Probal Dasgupta (prezidanto), Claude Nourmont (vicprezidanto, kongresoj, kulturo, edukado), Barbara Pietrzak (ĝenerala sekretario, informado), Loes Demmendaal (financoj, administrado), Maritza Gutierrez (landa agado), Amri Wandel (faka kaj scienca agado), Stefano Keller (eksteraj rilatoj).

3. Komitataj reviziantoj: Paulo Branco, Marcel Delforge.

4. Financa Komisiono: Flory Witdoeck, Gianfranco Polerani, Josep Franquesa Solé.

UK: Havano superis Vankuveron

Laŭ la retejo de UEA je la 20a de junio al la 95a Universala Kongreso de Esperanto en Havano aliĝis 943 personoj el 59 landoj, pli multe ol en la UKojn en Portland en 1972 (923) kaj Vankuvero en 1984 (802).

Plej multaj aliĝintoj estas el Kubo (157); sekvas Francio 112, Japanio 76, Germanio 70, Brazilo 66, Italio 41, Nederlando 32, Meksiko 31, Belgio 25, Pollando 22, Kanado 18.



Kaiserslautern. Kune dankas la lokajn organizantojn kaj fermas la sukcesan kongreson Xavier Dewidehem, prezidanto de UFE, kaj d-ro Rudolf Fischer, prezidanto de GEA. (C.N.)

Francoj kaj germanoj kunkongresis

21–25 maj 2010 la asocioj UFE (Francio) kaj GEA (Germanio) organizis komunan kongreson — ĉirkaŭ 250 partoprenantoj (pli ol la duono estis francoj) kunvenis en la palatinata urbo Kaiserslautern, ne malproksime de la franca landlimo.

Krom la statute devigaj kunvenoj de la asocioj, okazis i.a. movada foiro, publika kunveno de EEU, kunsidoj de EDE kaj de Unu Mondo, forumo pri la francaj Esperanto-kulturcentroj, prezento de la laboro ĉe Internacia Centro Herzberg, forumo de la federacioj de UFE, forumo pri Afriko. La komitato de UFE elektis novan estraron: Xavier Dewidehem (prezidanto), Cyrille Hurstel kaj Claude Nourmont (vicprezidantoj), Raymonde Coquisart (ĝenerala sekretario), Sébastien Montagne (kasisto).

Eblecoj por riĉigi sian kulturon estis vastaj. Ĉefprelegis Franz-Georg Rössler pri Palatinato inter Germanujo kaj Francujo. Funkciis tri libroservoj (de GEA, UFE kaj Kava-Pech) kun pluraj novaj eldonaĵoj. La kultura programo estis tute brila: la muzikgrupo *Kapriol'!* el Frislando ludis en la inaŭgura vespero kaj gvidis la folkloran balon; la koruso *Interkant'* prezentis la koruspomedon *Kanto Ĝenerala*, kaj Gijom Armide ĉe fortepiano montriĝis la plej ridiga malĝoja kantisto.

Abundis la programo de turismaĵoj, kiujn gvidis kompetentaj ĉiĉeronoj.

Ĉiuj konstatis, ke havi komunan kongreson estas multe pli agrable ol kunsidi nur inter samlandanoj. Bela kongresejo, centre en la urbo en agrabla

ĉirkaŭaĵo, kaj bona vetero certe kontribuis al la sukceso de zorge preparita diverstema programo. “Aparte ni ĝuis la eblecon por interesaj internaciaj kontaktoj kaj la agrablan etoson de la kongreso”, — skribis aŭstraj partoprenintoj.

Claude Nourmont

Brita Kongreso en Kimrio

Okazis la 91a Brita Kongreso de Esperanto en la kimra urbo Llandudno 14–17 maj 2010. Ĉeestis 79 homoj, plejparte britoj, sed ankaŭ el Belgio, Danio kaj Francio. Alvenis alilandanoj laborantaj aŭ studentaj en Britio, do entute partoprenis homoj el dek landoj.

Kuraĝige estis vidi novulojn kaj junajn kaj ne tiom junajn. La membroj de Junularo Esperantista Brita tre aktivis dum la semajnfino, kantante ĝis la tria horo matene.

Prelegis Anna Löwenstein dufoje, pri sia literaturo kaj la esploroj, kiujn ŝi uzis. John Wells enkondukis sian novan vortaron kaj klarigis la defiojn kiujn frontas vortaristo. Olga Kerziouk prelegis pri Eroŝenko kaj lia restado en Anglio, invitante kongresanojn al kunlaboro en esplorprojekto. Harry Barron klarigis la misterojn de la kimra lingvo.

Kunvenis pluraj t.n. “drondoj” (diskutrondoj) pri aktualaj sociaj temoj. Kongresanoj, kiuj hezitus leviĝi en plena kongresa salono por starigi demandon, partoprenis vigle en tiuj malgrandaj rondoj.

Je la fina tago kongresanoj ekskursis aŭtobuse al la kimra montaro Snowdonia / Eryri.

Hilary Chapman

Tutslovakia Esperanto-Renkontiĝo

21–23 maj 2010 okazis Tutslovakia Esperanto-Renkontiĝo en la feriejo Oliwa, proksime de Trenčianske Teplice.

Vendrede vespere okazis prelegoj pri Raymond Schwartz (Stano Marček) kaj pri Mediteraneo (Jano Vajs), kradrostado, kantado ĉe fajro, kaj nudpieda paŝado sur braĝo, magia evento kun sanigaj efikoj sub la gvido de Stano Marček.

Sabate okazis kunsido kaj elekto de la nova estraro de Slovacia Esperanta Junularo. La asembleo de SKEJ elektis jenajn kvin estraranojn: Magdaléna Korábová, Zuzana Kožuchová, Michal Matúšov, Katarína Nosková (prezidanto) kaj Peter Novotníček.

Post la elektoj la nova estraro pri-diskutis la du lastajn jarojn de la agado de SKEJ kaj dividis inter si novajn taskojn, inkluzive de la prizorgado de la retejoj www.esperanto.sk, www.hudba.esperanto.sk, esperantoje.blogspot.com, vikio.esperanto.sk. Pluraj SKEJ-anoj decidis kune organizi ĉi-jare serion de prelegoj pri Esperanto en baz- kaj mez-lernejoj.

Samtempe sed aliĉambre, okazis kongreso de Slovacia Esperanta Federacio (SKEF). La estraranoj interŝanĝis siajn postenojn. La nova prezidanto estas Stano Marček, la vicprezidanto Rast'o Šarišský, la kasisto Jarmila Rektorisová kaj la revizoro Alexandra Vališová. La kongreso aprobis novan statuton de SKEF, laŭ kiu krom la ĝisnuna “kolektiva membreco” ekvalidas novaj membrokategorioj: la individua kaj la reta membrecoj. La nova komitatano A por Slovakio estas Petro Baláž.

Estis diskutita la propono de Peter Chrdle pri la trilanda konferenco (de Ĉeĥio, Aŭstrio kaj Slovakio), kiu okazu en la jaro 2012 en Břeclav, kaj oni konsentis kun la propono.

Dum la sabata solena vespero Rast'o Šarišský deklaris la rezultojn de la enketoj pri la Esperantisto kaj Ago de la jaro 2009. Kiel la Esperantisto de la jaro estis elektita Stano Marček, pro instruado de Esperanto kaj informado pri Slovakio en esperantista medio. La duan enketon gajnis kreo de la grupo *Podporujem esperanto* (Mi subtenas Esperanton) en la socia reto Facebook.

Dum la renkontiĝo okazis pliaj prelegoj, kvizo pri Esperanto (Marek Blahuš, Peter Baláž) kaj ekskurso al la proksima Diabla roko, kun “geokaŝado” (Marek Blahuš).

Katarína Nosková

Sveda kongreso ĉe Esperanto-Domo

En la kampara urbeto Lesjöfors situas la Esperanto-Domo (Esperanto-Gården), kie 14–16 maj 2010 okazis la jarkongreso de Sveda Esperanto-Federacio kun kvindekda partoprenantoj.

La ĉefa kultura programero estis la prezento de la monodramo *Ludoviko-Lazaro* de Georgo Handzlik (Pollando), en kiu li sola ludis ĉiujn rolojn kaj prezentis la vivon de Zamenhof en interesa maniero.

Kristin Tytgat (Belgio) donis praktikajn informojn pri la nova eŭropa ekzamen-sistemo, Komuna Eŭropa Referenc-kadro (KER), kun ekzemploj pri ekzamenaj demandoj. Ŝi ankaŭ prelegis pri la temo “Unu lingvo, malsamaj kulturoj”, kun elirpunkto je siaj propraj spertoj, kaj kun la lerto de instruisto por eŭropaj interpretistoj, ofte en amuza maniero, sed kun profesia enhavo.

La junulara grupo, kiu konsistigis preskaŭ trionon de la partoprenantoj, havis proprajn programerojn sub la titolo Anemona Renkontiĝo.

En la antaŭkongresa tago estis ekskurso al folkloro centro kaj al artekspozicio, samtempe kun rigardo al pluraj el la lokoj, kiujn la sveda aŭtorino Selma Lagerlöf uzis en siaj libroj.

Ulla Luin

En la lando de libereco

Antaŭ cent jaroj d-ro L.L. Zamenhof faris la faman prelegon “Lando de libereco, lando de estonteco, mi vin salutas” en la 6a Universala Kongreso de Esperanto en Vaŝingtono.

Ĉi-jare, dum la kvar lastaj majaj tagoj cento da partoprenantoj de la 58a landa Esperanto-kongreso en Vaŝingtono kunvenis proksime al la loko, kie Zamenhof iam parolis. En la kongreso okazis voĉdonado por la nova estraro de Esperanto-USA. Ĉiu estrarano servos de jore ĝis la landa kongreso de Esperanto-USA en la koncernaj jaroj:

Phil (“Filipo”) Dorcas, prezidanto (2011); Tim Westover, vicprezidanto (2011); Christopher Zervic, kasisto (2012); Steve Brewer, sekretario (2013); Mar Cardenas, estrarano (2011); D. Gary Grady, estrarano (2011); Ros Haruo, estrarano (2011); Tor Kinlok, estrarano (2012); Orlando Raola, estrarano (2012); Julie Winberg, estrarano (2012); Julie Spickler, estrarano (2013); Ĝan Starling, estrarano (2013); George Baker, estrarano (2013).

Phil Dorcas



Post cent jaroj en Peterburgo

27–31 maj en Sankt-Peterburgo cent jarojn post la unua Ruslanda Esperantista Kongreso (1910) okazis la 26a REK. Al ĝi aliĝis ĉ. 230 personoj el pluraj landoj, kaj multaj aliĝintoj partoprenis la kongreson. Bedaŭrinde, neniu partopreninto konsentis verki artikolon pri la kongreso, kaj nur unu kongresano sendis siajn impresojn (vd. p. 17). Ĉi tial ni aperigas nur la decidojn de la konferenco de la landa asocio REU, kiuj aperis en la asocia dissendolisto.

Decidoj

de la 25a Konferenco de REU

1. Taksi la laboron de la Estraro kontentiga.
2. Aprobi la raporton de la Kontrol-revizia Komisiono.
3. Aboli la Provizoran Regularon pri la Konsilio de REU.
4. Elekti la Estraron de REU en la konsisto: Grigorij Arosev (Moskvo) — prezidanto, Svetlana Smetanina (Moskvo) — vicprezidanto, Vladimir Bepalov (Soĉi), Jurij Karcev (Uljanovsk), Rafija Kudrjavceva (Jekaterinburg), Darja Obrazcova (Sankt-Peterburgo) — membroj.
5. Elekti la Kontrol-revizian Komisionon de REU en la konsisto: Oleg Cyganov (Sankt-Peterburgo) — prezidanto, Gennadij Basov (Moskvo), Ludmila Novikova (Moskvo) — membroj.
6. Elekti Komisiitojn: pri dokumentado — Viktor Aroloviĉ (Moskvo), pri buĝeto — Roman Bolŝakov (Moskvo), pri retlistoj de REU — Georgij Kokolija (Moskvo), pri financoj — Valerij Sipoviĉ (Moskvo).
7. Elekti Nikolaj Gudskov (Moskvo) Komitatano A de UEA.
8. Rekomendi al UEA nomumi Svetlana Smetanina (Moskvo) ĉefdelegito de UEA en Rusio.
9. Komisii al la Estraro esplori proponojn, prezentitajn al la Konferenco.

Kenjo eniras Esperantujon

Grava tasko de UEA estas la disvastigo de Esperanto en landoj, kie mankas organizita movado aŭ ĝi ankoraŭ ne estas sufiĉe forta por mem respondi pri tio.

Pri tiu agado ĉefe zorgas la regionaj komisionoj de UEA. Ekzemple, tiu pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) lastatempe subvenciis vojaĝojn de instruistoj interalie al Srilanko, Laoso, Indonezio kaj Birmo.

Ĉiam pli aktiva estas la Komisiono pri Afriko, kiu ĵus sendis sian membron, la burundanon Jeremie Sabiyumva, instrui Esperanton en Kenjo. Pro la graveco de tiu lando en Afriko, UEA nun donas al ĝi sisteman atenton. Pli frue jam Costantine Mashauri, tanzania delegito de UEA, vojaĝis tien por esplori la situacion kaj ligi kontaktojn kun aktivuloj de la pasintjare fondita Kenja Esperanto-Asocio. La nova asocio nun prepariĝas por registriĝo ĉe la Ministerio pri Sociaj Aferoj.

Jeremie Sabiyumva gvidis kurson en Nandi Hills, kie lin akompanis Julius Kirwa kaj Evans Ochoki, respektive prezidanto kaj ĝenerala sekretario de KEA. La kursanoj ne estis komencantoj, sed ili jam antaŭe lernis koresponde kaj per lerniloj senditaj de la Afrika Oficejo de UEA. Ili tamen malofte povis praktiki la lingvon kun aliaj esperantistoj. Temis pri progresantoj, kiuj pretas memstare gvidi kursojn en siaj loĝlokoj. Partoprenis naŭ personoj; la plej juna 32-jara kaj la plej aĝa 49-jara. Krom pri gramatiko, ili lernis pri la historio de Esperanto ĝenerale kaj en Afriko aparte, pri organizado de landa movado kaj pri informado.

La kurso finiĝis per ekzameno, kiun ĉiuj sukcese trapasis.

Sabiyumva promesis al la aktivuloj de KEA, ke en proksima estonteco la Afrika Komisiono de UEA klopodos sendi alian esperantiston al Kenjo por unu monato. Li instigas ankaŭ eksterafrikajn esperantistojn viziti tiun turisme allogan landon por doni al la esperantistoj tie pli da rektaj kontaktoj kaj okazoj por praktiki la novan lingvon.

Sabiyumva alvokas helpi la kenjan movadon per mondonacoj al Fondaĵo Afriko de UEA, kiu financas la instruvojaĝojn kaj provizadon per lernomaterialoj, aŭ per sendado de lerniloj, libroj kaj aliaj esperantaĵoj rekte al Kenja Esperanto-Asocio, P. O. Box 204, Eldoret, Kenjo.

GK UEA

Centjariĝo en Bjalistoko

Antaŭ cent jaroj, 29 maj 1910, sepdeko da esperantistoj, renkontiĝis en la Komerca Klubo de Bjalistoko kaj decidis fondi la Societon *Zamenhof*.

Cent jarojn poste la unua revo de la Bjalistoka pioniro Jakobo Ŝapiro estis realigita — la Podlaĥia Biblioteko malfermis sian filion №14 “Esperanto-Libraro”. Decembre 2009 en Bjalistoko estis eldonita *Podlaĥia Antologio*. Sekvis ĝin en majo la 220-paĝa poemaro de Jan Leończuk *Mi forgesis vin miaj arboj*. Dum la aŭtora duonhora Jan Leończuk legis siajn poemojn en la pola lingvo. Tomasz Chmielik kaj Lidia Ligeża faris tion Esperante. Bjalistoka Esperanto-Societo anoncis la kampanjon “100 je 100” petante esperantistaron donaci al la biblioteko en Bjalistoko 100 librojn okaze de la centjariĝo de la E-movado en Bjalistoko kaj preskaŭ ĉiuj venis kun donacoj al la jubileo fine de majo.

Dum la sabata (29 maj) pilgrimado la partoprenantoj starigis du krucojn: la romkatolikan en la sanktejo de Sankta Akvo ĉe Bjalistoko kaj la ortodoksan en la sanktejo sur la Sankta Monto Grabarka. Metado de floroj ĉe la Monumento al Herooj de Bjalistoka Geto fermis la ekumenan cirkolon “Pacon al ĉiuj”.

Tomasz Chmielik kaj Elżbieta Karczewska prelegis pri la du kolonoj de la Esperanto-movado en Bjalistoko — Jakobo Ŝapiro kaj Leono Kłodecki.

Dimanĉe ni forvojaĝis al Grodno (Belorusio) por trovi spurojn de Ludoviko Zamenhof. Danke al Andrej Vaškeviĉ el la Historia Muzeo de Grodno ni trovis la domon, en kiu dum 1893–1897 loĝis Ludoviko, konatiĝis kun arkivaj dokumentoj pri intermilita korespondado en

Starigo de kruco en la ortodoksa pilgrimejo Grabarka (Fotis Robert Kamiński)



Krystyna Łybacka

Por egalrajtigo de Esperanto

La 17an de majo parlamentanino, prof. Krystyna Łybacka proponis interpelacion pri Esperanto. Ĝi estas konsekvenco de la renkontiĝo de la Iniciata Grupo “Esperanto por EU” kun la vicprezidanto de la Pollanda Sejmo (parlamento) Jerzy Szmajdziński (4 mar 2010) kaj de la renkontiĝo kun prof. Łybacka (29 mar 2010), kaj posta korespondado.

Sube estas la teksto, ricevita en Varsovio la 20an de majo.

Eduardo Kozyra

Al Estimata Sinjoro

Bronisław Komorowski

Prezidanto de la Pollanda Sejmo

Estimata Sinjoro Prezidanto.

Laŭ la artikolo 193 de la Regularo de la Pollanda Parlamento mi transdonas al la manoj de la Prezidanto de la Pollanda Parlamento la skriban interpelacion pri instruado de Esperanto, direktitan al la ministro de Nacia Edukado.

Estimata Sinjorino Ministro,

la lingvo Esperanto, kreita de Ludoviko Zamenhof, estas granda lingvistika atingaĵo, pro kiu ni poloj devus esti tre fieraj. Trista fakto estas, ke ĉi tiu lingvo malgraŭ sia populareco en la tuta mondo, ne estas aprezata en la lando, en kiu ĝi ekestis.

La ĉefaj kvalitoj de Esperanto estas ĝiaj simpleco kaj facileco de la lernado. Kiel montras la esploraj rezultoj en aliaj landoj, kunigo de la lernado de Esperanto kun lernado de aliaj lingvoj, ebligas pli bonan lernadon.

Polaj esperantistoj de multaj jaroj klopodas oficialigi Esperanton en la publikaj lernejoj. Tamen sur ĉi tiu vojo estas leĝaj problemoj, ligitaj kun la falsa klasifiko de la lingvo kiel artefarita. Tio malebligas alligi Esperanton al la fremdaj lingvoj, kiujn lernantoj povus elekti kiel devigan studobjekton.

La Ministerio de Nacia Edukado havas eblecon iniciati programon, kies celo estus oficialigo de Esperanto en la Pollandaj lernejoj. Tia solvo kuraĝigus junajn polojn ekkoni la universalan lingvon, kies valorojn konas iliaj samaĝuloj en aliaj landoj.

Mi tre petas sinjorinon ministrinon respondi, ĉu la Ministerio de Nacia Edukado planas entrepreni agadon al la celo de popularigo kaj diskonigo de Esperanto inter polaj gelernantoj, kaj, se jes, en kiu formo ĝi estos realigota.

Kun estimo,

Krystyna Łybacka

Tradicia Boatado en Litovio

Fine de majo la junulara Esperanto-Klubo *Juneco* (Vilno, Litovio) okazigis la 44an Boatadon en la Aŭkŝtjta Nacia Parko. La grava kondiĉo estas kapablo kaj volo paroli nur Esperante dum la tuta aranĝo, aliaj lingvoj estas malpermesitaj. Pri tio prizorgas sekreta verda policist(in)o.

Ĉi-jare 24 esperantistoj el Litovio, Latvio kaj Pollando dum tri tagoj tra-boatis pli ol 20 lagojn kaj lagetojn, riverojn kaj riveretojn. La Boatado komenciĝis en Paluše apud la lago Lušiai post registriĝo, luo de bezonata inventaro, formado de boateamoj kaj solena malfermo kun solena ĵuro. La partoprenantojn atendis malrapida kaj plezura navigado, observado de nuboj, notado de pitoreska pejzaĝo kaj intertempa tagmanĝo. La unua tendarloko estis en Vaišniunai, kie oni gaje pasigis la tempon: ludis pilkon kaj keglojn, vespermanĝis kaj kantis preskaŭ dum la tuta nokto ĉe lignofajro.

La duan tagon la esperantistoj aperis ĉe la suda bordo de la lago Baluošas. En la insulo de naskiĝtagoj okazis pompa kaj santepe kortuŝa festo de la naskiĝintoj en majo. Kontentaj partoprenantoj fornavigis al la digo de Ginučiai, kie haltis kaj tagmanĝis en pitoreska ĉirkaŭaĵo de akvomuelejo. Post la longa navigado tra la danĝere rapidflua kaj misvojiga rivereto Almaja boateamoj finfine atingis la tendarlokon ĉe la kastelmonto Ginučiai, kie malfruvespere okazis baptado de unuafajaj boatadantoj. Meznokte la baptitoj kaj la spertuloj kolektiĝis ĉe lignofajro kaj babilis pri ĵusaj impresoj.

La lastan tagon post la mallonga dormado, matena naĝado kaj ordigo de la tendarloko oni malrapide fornavigis al Paluše. Revenante ni observis la belan panoramon de Glacimonto, poste haltis ĉe la bordo por trinki kafon kun brando. Finfine ĉiuj alvenis al Paluše, kie okazis solena fermo de la Boatado.

Ĉiuvespere la Esperanta kompanio havis varmegan supon kaj ĝuis freŝan teon el herboj kolektitaj en arbaro. Marijus Dilba kuraĝis havi akvajn procedurojn sub la akvofala malvarma duŝo. La verda policisto Kazys Svydenis, kiel vera spiono, ne diskonigis sin dum la tuta aranĝo. Irek Bobrzak montris raporton pri la klubo *Varsovia Vento* per portebla komputilo, kaj intervjuis ĉiujn pri impresoj de la Boatado.

La Boatado sukcesis!

Inesa Balaikienė, Olga Strojewa



Boatado 2010 (Fotis Jolanta Dudėnaitė)

Scienco, pikniko kaj Esperanto

Ĉirkaŭ 250 institucioj kaj organizoj el Pollando kaj eksterlando partoprenis 12 jun la 14an Sciencajn Piknikon en la urbocentra parko de Varsovio. La Scienca Pikniko, organizata ekde 1997 de la Pola Radio kaj Scienca Centro “Kopernik”, apartenas al la plej grandaj en Eŭropo subĉielaj aranĝoj, kiuj celas popularigon de sciencaj, teknikaj kaj sociaj aktivadoj.

En pli ol 250 grandegaj budo-tendoj oni povas ekscii pri diversaj aspektoj de la civiliza evoluo, tuŝi prezentatajn objektojn, ekscii sciencajn novaĵojn, mem eksperimenti, ekkoni la esplorojn de sciencaj institutoj, ekscii pri la atingoj de ekologio, sana vivo kaj kuirarto... kaj jam la duan fojon ankaŭ pri Esperanto!

En la Esperanto-tendo eblis informiĝi pri la lingvo kaj la movado, trarigardi ekspozicion de libroj kaj revuoj, retumi tra esperantistaj retejoj, ludi Esperantajn skrablojn, traduki sian nomon en Esperanton, ktp. Infanojn atendis ludoj kaj konkurso postulanta plenumon de taskoj premiataj per verda balono kun la vorto “Esperanto”. Trans la piedvojo, antaŭ la esperantista tendo, en provizora klasĉambro kun seĝoj kaj tabulo, oni povis partopreni provlecionojn de la lingvo.

Esperanton dum la Scienca Pikniko prezentis aktivuloj de la Varsovia kaj Lodza filioj de PEA kaj membroj de *Varsovia Vento*: Roman Dobrzyński, Barbara Pietrzak, Mariusz Majewski, Zofia Śmistek, Roman Gil, Alina kaj Agnieszka Mozer kaj Irek Bobrzak.

Sonraporton pri la evento kaj ligilon al la foto-galerio vi trovos en la subpaĝo de la 60a elsendo de *Varsovia Vento*: www.podkasto.net.

Irek Bobrzak

Bela festo en Razgrad

Komence de junio la geesperantistoj el la bulgara urbo Razgrad festis la dudekjariĝon de la Internacia Esperantista Krea Renkontiĝo *Abritus* kun la literatura konkurso, iniciatita de la Esperantista Kulturdomo “D-ro Ivan Kirĉev”.

La jubileo komenciĝis en la klubejo de kulturagantoj per premiera prezento de la nova libro *Kardo sur kasko* — hajko-poezio verkita Esperante kaj bulgare de Ivaniĉka Maĝarova. La libron prezentis ĝia redaktoro Lubomir Trifonĉovski. La aktorino Marie Eneva plenumis hajkojn de la nova libro.

La partoprenantoj en la jubileo — ĉirkaŭ kvindek geesperantistoj — vizitis Sveŝtaran trakan nekropolon kie ĝuis belajn vidindaĵojn. En la bela salono de la urba biblioteko “Prof. Bojan Penev” Ivaniĉka Maĝarova salutis ĉeestantojn, koncize rememorigis la problemojn kaj atingojn dum la dudek jaroj.

Poste la prezidanto de la ĵurio, Lubomir Trifonĉovski anoncis rezultojn de la literatura konkurso EKRA 2010. La unuajn premiojn ĉi-foje gajnis Jaroslav Kroluper (Ĉeĥio), Nula Horo (Hispanio) kaj Lenke Szász (Rumanio), la duajn premiojn gajnis Lina Gabrieli (Italio), Marie-France Conde-Rey (Francio) kaj la trian Benôit Philippe (Germanio).

Laŭ la premiitaj verkoj oni plenumis recitalon. Pianludis infanoj el la muzika lernejo. La prezidanto de BEA Petar Todorov enmanigis diplomojn al la sukcese ekzamenitaj Esperanto-kursanoj. La partoprenantoj trarigardis ekspozicion, spektis DVD filmojn pri la kulturdomo Ivan Kirĉev. Kompreneble oni amuziĝis, dancis kaj parolis Esperante en la propra kafejo *Esperanto*.

Ivaniĉka Maĝarova



Interkultura dialogo, la tria etapo

10–16 apr 2010 la delegacioj itala, hispana kaj portugala renkontiĝis en Don Benito, en Ekstremaduro okaze de la tria renkontiĝo kadre de la projekto Komenio 2008–2010 “Interkultura kaj multlingva dialogo, helpe de la neŭtrala lingvo Esperanto, inter la Eŭropaj lernejoj. Homaj rajtoj de la infanoj kaj de la adoleskantoj en Eŭropo”.

Ilin gastigis I.E.S. Cuatro Caminos kaj la Centro Educativo Municipal en Don Benito. La gastigitaj lernejoj estis la SMS “Cavour” de Modeno (Italio) kaj la Escola Secundaria “Braamcamp Freire” de Lisbono-Pontinha (Portugaliao).

La tempo pasigita kune estis saturita de viglaj interŝanĝoj de informoj pri la lingvoj Esperanto, hispana kaj de la signoj, sed ankaŭ de intensaj neformalaj festenoj kaj kontaktoj inter adoltoj kaj gejunuloj, ebloj por komparado kaj programado, interŝanĝado de informoj kaj retadreso, ankaŭ dum la ekskursoj kaj vizitoj al monumentoj civilaj kaj religiaj de Don Benito, Mèrida, Sevilo, Medellin kaj Càceres.

La temo estis inspirita de la infanaj rajtoj, libere tradukitaj el la Internacia Konvencio pri la Infanrajtoj, aprobita de la Ĝenerala Asembleo de UN en 1989.

Dum la restado en Don Benito kaj dank’ al la bonega organizado fare de la membroj de la hispana grupo, eblis disvastigi plue la mesaĝon kiun inspiras la Projekto “Interkultura kaj multlingva dialogo pere de la neŭtrala lingvo Esperanto”, ĉar la delegacianoj estis intervjuitaj de la loka televido *Octo*.

La projekto interkultura dialogo kaj alternativa komunikado inter Italio, Hispanio kaj Portugalio signis, per tiu ĉi vizito, la trian kaj lastan etapon de la programita itinero. Ni esperas revidi nin en aprilo 2011 kun renovigita propono kaj kolekti pluajn aliĝojn de aliaj lernejoj de Eŭropo.

Luigia Oberrauch

Virtuala renkontiĝo

En ĉi tiu lernoĵaro en la baza lernejo Janko Glazer en Ruŝe (Slovenio) Esperanto estas instruata en infanĝardeno (5–6-jaraj) kaj en la unua klaso de la bazlernejo (6–7-jaraj). Simila projekto okazas en Britio en The Vine Inter-Church Primary School, kiun gvidas Tim Morley.

20 maj la slovenaj kaj britaj lernejoj renkontiĝis helpe de la programo *Skype*. Inter la infanoj fluis interesaj konversacioj/dialogoj. Ambaŭ grupoj kantis sialingve kaj en Esperanto.

Tio estis tre bona sperto por la infanoj, kiuj nun scias, ke ili povas interparoli kun aliaj, ne nur lerni en lernoĉambro.

Laŭ *Eŭropa Bulteno*

Italio: Junularo en montaro

14–16 maj okazis la 2a Montara Junulara Semajnfino, organizita de la IEJ-estraro en la belega urbeto Montescheno, en la nordorienta Piemonto.

La plej grava MJS-tago estis la dua, ĉar ĉiuj partoprenantoj atingis la renkontiĝejon dum la sabata mateno: tio ebligis komenci kaj plenumi la stimulajn grupajn spertojn dum la tuta tago.

Okazis ekskurso tra la vilaĝeroj proksime de Montescheno, kaj tre agrabla montara pikniko. Post reveno al la loĝejo komenciĝis longa, riĉa kaj malferma estrarkunsido de Itala Esperanto-Junularo (IEJ), kiu interrompiĝis por la vespermanĝo kaj rekomenciĝis poste. Dum la kunsido oni aliris plurajn problemojn estantajn kaj estontajn.

Dimanĉe, dum la mateno, eblis al iuj kamparanumi kaj al iuj dommastrumi — kune kaj amuze, kompreninde! Dum la tagmanĝo ni konversaciis pri la Esperanto-movado, ĝia historio kaj ĝia nuna stato, per interesa kaj riĉiga opinia interŝanĝo, precipe por la neestraranoj.

Sara Spanò

Gvidlibro de la amikeco

Komence de majo 2010 en la franca urbo Vaulx-en-Velin okazis la dua renkontiĝo kadre de la projekto “Gvidlibro de la amikeco”, financata de la programo “Lernado dum la tuta vivo”.

La temo de la renkontiĝo estis “Eŭropo — pasinteco, estanteco kaj estonteco”. La preparado por la renkontiĝo inkluzivis ellaboradon de paneloj kun la mapo de la Eŭropa Unio, preparado de multmediaj prezentaĵoj laŭ la temo “Historia disvolviĝo de la partneraj landoj dum la periodo inter la jaroj 1200 kaj 1299”, preparado de informtabuloj por la apero kaj la evoluo de la Eŭropa Unio.

Partoprenis gelearnantoj kaj geinstruistoj el Bulgario, Hungario, Pollando kaj Francio, kiuj ĝojis pro la renkontiĝo kun siaj geamikoj, kun kiuj ili konatiĝis dum la unua kunveno en novembro 2009 en Polski Trzbieŝ (Bulgario).

La partoprenantoj estis dividitaj en grupoj, kiuj inkluzivis reprezentantojn el ĉiuj landoj. Neniu havis eblecon paroli sian gepatran lingvon, kaj ĉiu devis uzi Esperanton, kaj kiam tio ne sufiĉis, helpis vortoj el la angla, germana, pola, franca kaj rusa lingvoj. La taskoj estis interesaj — ellabori la simbolojn de EU, profundigi la sciojn pri la kreado kaj evoluo de EU kaj la historian antaŭeniron de niaj landoj.

Ni vidis ĉiujn multmediajn prezentaĵojn laŭ la temo “Historia disvolviĝo...” Evidentiĝis, ke la historioj de niaj ŝtatoj estas tre diversaj, sed ke niaj popoloj estas kunligitaj dum multaj jarcentoj. Ĉiuj kune kantis la himnon de la Eŭropa Unio en Esperanto.

Kiel ekzemplon de la historia evoluo de Francio ni vizitis la urbeton Peruges, kiu dum la 13a jarcento estis grava historia centro en la lando. Por konatiĝi pli bone kun niaj francaj partneroj ni vizitis lecionojn pri historio, geografio, matematiko; kaj ni vidis, ke la gelearnantoj tie ne estas malsamaj ol la niaj, kaj ke la instrumentadoj estas la samaj.

Dum la libertempo ni vizitis Lionon, trarigardis la historian muzeon, eniris en la bazilikon Notre-Dame de Fourvière, supreniris al la monta kvartalo La Croix-Rousse, vidis la fontanon de Bertoldi kaj la statuon de Ludoviko XIV.

Ni disiĝis kun la promeso denove renkontiĝi en oktobro 2010 en la hungara urbo Tiszafüred por la tria laborkunveno, kies temo estas “La eŭropanoj — egalaj, sed diversaj”.

Mariana Genĉeva

Internaciisme en Reus

21–23 maj la kataluna urbo Reus gastigis la 7an Internaciisman Renkontiĝon, organizitan de Kataluna Esperanto-Junularo kaj Maulets, revoluciema junulara sendependisma organizo, kun subteno de la magistrato de Reus kaj la historia Lego-centro de la urbo.

La kunagado kun lokanaro neesperantisma igis la renkontiĝon riĉa je interŝanĝo. Partoprenantoj ricevis folion kun plej oftaj kaj utilaj frazoj en Esperanto kaj la kataluna; tial lokanoj kaj eksterlandanoj ekigis konversaciojn kaj la emo interkompreniĝi fariĝis evidenta, eĉ spontanee aperadis novaj frazoj en la folioj, ĉefe flirtocele. La socia rezulto: Maulets ekinteresiĝas pri Esperanto, nekatalunaj esperantistoj konas pli profunde la katalunan socion.

Du salonoj akceptis la prelegojn, kaj en centra placo Peixateries Velles okazis la kunvivado, la manĝoj, la koncertoj kaj la dancoj. En la sama placo staris libroservo de Kataluna Esperanto-Asocio, la diskoservo de *Vinilkosmo*, la trinkejo de Maulets kaj la akceptejo.

Alexandre Raymond, Jean-Marc Leclercq kaj Ander Martínez gvidis rondotablon pri siaj lingvoj, t.e. la arpitana, la okcitana kaj la eŭska; la rondotablo estis prezentita unue en Esperanto, kaj sekve en la kataluna. La programo proponis al esperantistoj atelieron pri tradiciaj homaj turoj kaj enkondukon al la kataluna lingvo. Al lokanoj la programo proponis atelieron pri lingva daŭripovo kaj enkondukan kurson de Esperanto. Al ĵusbakitaj esperantistoj la renkontiĝo proponis enkondukon al la Esperantomovado, sesion kun dubosolvanto kaj praktikan kurson de Esperanto celanta konversacii en la renkontiĝo.

La katalunlingva programo enkondukis Esperantajn valorojn kaj kulturon al lokanoj, kaj esperantlingva programo enkondukis la partoprenantojn al la kataluna kulturo. Sed la plej gravaj programeroj estis komunaj, cele al kunagado. Estis tri koncertoj: vendrede nokte koncertis lokaj DJoĵ okazigintaj festegan junan etoson en la placo; sabate la neelĉerpebla JoMo dancigis kaj kantigis la tutan ĉeestantaron per sia plurlingva spektaklo; dimanĉe koncertis loka grupo *Nomadah la Ghana* kiu surprizis la publikon per kanto en Esperanto. La komuna programo dulingva ankaŭ proponis atelieron pri tutmondaj popoldancoj fare de Mon Cardona kaj historikultura vizito al la urbo Reus.



En Reus eĉ la Esperanto-libroservo funkciis ekstere. (*Fotis Mon Cardona*)

Estis bela vetero. Estis agrablaj retroviĝoj. Sed plej grave, estis forta socia profito. Kelkaj neesperantaj sindikataj, politikaj kaj sociaj organizoj ekdebatas pri la enkonduko de la internacia lingvo en siaj regularoj kiel rekomendo al internacia komuniĝo daŭripova kaj neimperiisma. Deko da partoprenintoj en la renkontiĝo jam anoncis sian ĉeeston en venontaj kursoj de Esperanto.

Ferriol Macip

Kvalita etikedo por KCE



Pli ol cent institucioj estis kunvokitaj, trideko trapasis la trejnadon per propra reprezentanto, nur dek unu estis selektitaj, kaj fine restis nur sep akceptitaj de la plej supra turisma instanco en Svislando, por projekto de “kvalita etikedo” en la Neŭŝatela kantono.

La diplomitoj estas du hoteloj, du restoracioj, fako de la kantona polico, muzeo kaj... Kultura Centro Esperantista (KCE), kiun reprezentis Giorgio Silfer. La turisma instanco en Berno aprobis kun laŭdo la projekton de kvalita plibonigo de li prezentitan, kadre de la strebo por la lanĉo de Ĉaŭdefono kiel turisme pli alloga urbo, post la enskribigo en la Unesko-listo de la Monda Kultura Heredaĵo.

La projekto de KCE koncernas la dimension de libertempaj loĝejoj kaj konferencejo. Helpe de Fonduso Pro Esperanto kiel regio, signifaj plibonigoj estas realigataj en la Esperanto-Domo.

HeKo

Iom da espero en Kantoo

La unuan junian semajnfino okazis la 59a Esperanto-Kongreso de la regiono Kantoo (Tokio kaj la ĉirkaŭaj ses gubernioj) en la urbo Ĉoohu kun 139 aliĝintoj — plej multe dum la lasta jardeko. Sed el ili nur 85 aliĝintoj efektive partoprenis la kongreson.

En la unua tago okazis ĝenerala kunsido de la Kantoo Esperanto-Ligo, en kiu oni decidis la planojn en 2010. Vespere en bankedo en la najbara restoracio ni manĝis kaj drinkis, montrante niajn talentojn, kaj gaje pasigis tri horojn.

En la dua tago estis la malferma ceremonio: himno, salutoj de la prezidantoj de la Kantoo Esperanto-Ligo kaj de la Japana Esperanto-Instituto, salutoj de eksterlandaj partoprenantoj el Ĉinio, Ruslando kaj Israelo, kondolencoj al la esperantistoj forpasintaj dum la pasinta jaro.

Sekvis kvin kunsidoj (koncerto de mandolino, Esperanto-kantoj, hietoriterapio, Tajĝiĉuan, sciencistoj, medicinistoj). Bill Mak, kiu devenas de Honkongo kaj nun studas la Baratan filozofion en la universitato Kioto en Japanio, prelegis pri nekonata historio de Ĉinio en la periodo 1946–1976. La kongresanoj havis ankaŭ promenadon en la historia loko de la urbo Ĉoohu.

La japana movado suferas pro la maljuniĝo, sed ni povas vidi iom da espero en ĉi-jara partoprenantaro.

Hori Jasuo

Kongreso malfermita al publiko

La 58a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo havis lokon 5–6 jun en la urbo Nara, fama loko kiel la malnova japana ĉefurbo kaj pro cervoj, kiuj libere loĝas kun homoj.

202 personoj aliĝis al la kongreso, sed reale ĉeestis 143 personoj, inkluzive de Wang Tian-yi el la ĉina urbo Siano (Xi'an), la prezidanto de Xi'an-a Esperanto-Asocio. Nara kaj Siano estas ĝemelaj urboj. Kiam en la jaro 710 Nara ĉefurbiĝis, la urbo estis konstruita laŭ la modelo de Siano.

Wang faris prelegon kun interpretisto pri la urbo Siano malnova kaj nuntempa. D-ro Senda, fama historiisto prelegis pri la ĉefurbo Nara kaj pri japana ambasado al Ĉinio. Ambaŭ prelegoj estis malfermitaj, kaj ĉirkaŭ kvardek neesperantistoj vizitis la kongresejon.

Kimoto Yasuhiro



JS: duafoje en Harbino

La 2a Junulara Seminario de Esperanto okazis 14–16 maj en Harbino, la ĉefurbo de la ĉina provinco Heilongjiang.

La interkona vespero okazis vespere de la unua tago en la Heilongjiang-a Sciencteknika Instituto kun ĉirkaŭ 50 samideanoj, inkluzive de ok el Vladivostoko (Ruslando).

Matene de la dua tago en la feriejo Fudong, apud Harbino, okazis inaŭguro, kiun prezidis studentino Gao Wanchao. Shi Chengtai, prezidanto de la Heilongjiang-a Esperanto-Asocio, diris en sia parolado, ke lastatempe oni ĉagreniĝas pro la maljunuliĝo de nia movado, tial la asocio lanĉis kursojn inter gejunuloj, per amuza maniero instruante Esperanton kaj gajnante certan rikolton. Prof. Yin Tiechao, prezidanto de la Heilongjiang-a Fremdlingva Instituto, konfirmis, ke oni klopodas persiste lerni kaj uzadi Esperanton en la instituto.

Posttagmeze ĉeestantoj parolis pri la seminaria temo “Esperanto kaj la ĉina tradicia kulturo” kaj varme diskutis.

Aleksandr Titajev rakontis, ke ekde 1903 la Ruslanda inĝeniero Kazi-Girej, laboranta en la Ĉina-Orienta Fervojo, gvidis la unuajn Esperanto-kursojn en Harbino kaj fondigis la Harbinan Esperanto-Societon. Zhang Jiping, prezidanto de la Jilin-a Esperanto-Asocio, prelegis pri la luktarto Taiji, lia rakontado impresis precipe la rusajn samideanojn, kiuj dum la ripoza tempo eklernis la luktarton Taiji de s-ano Zhang.

Post la diskuto gejunuloj prezentis la artajn programerojn sub la gvido de studentino Zhao Ning. Inter kantoj, dancoj kaj skeĉoj oni disdonis premiojn al la plej bona kursano, aŭtoro de la elstara artikolo, ŝatata Esperanto-instruisto, elstara movada aktivulo, organizanto de arta programo... La gestudentoj donis al sia estimata instruistino Song Ping grandan atestajon, propramane preparitan.

Post la vespera bankedo Ruslandaj gastoj prezentis la fabelan drameton *Kuiristo kaj kato* kaj projekciis la filmon *Orfiŝo kaj fiŝisto* laŭ la fabela poemo de Puŝkin.

La lastan tagon en la fermo Shi Chengtai raportis pri la seminaria temo. Gestudentoj Niu Xueqing kaj Qiao Hui voĉlegis la rezolucion de la seminario kaj anoncis, ke la 3a JS okazos en majo 2011 en Harbino. Posttagmeze ĉiuj revenis en Harbinon, kie oni vizitis vidindaĵojn kaj butikumis en rus-stila strato.

Shi Chengtai

Esperanto, matematiko kaj kastelo

Ĉu Esperanto taŭgas por priskribi matematikaĵojn? Ĉu matematiko taŭgas por analizi Esperanton? Por trovi respondon al tiaj demandoj ni, Martin Meyer kaj Benno Frauchiger, nevidanto kaj vidanto el Svislando, fine de aprilo vojaĝis al la kvintaga seminario “Esperanto kaj matematiko” en la kastelo Greziljono.

La temo “Esperanto kaj matematiko” ebligas plurajn alirmanierojn. Kiel esprimi matematikaĵojn en Esperanto? Kiel analizi Esperant-lingvajn vortojn, esprimojn, frazojn per aplikado de matematika regularo? La ĉefpreziantanto de la tuta temaro estis la franca informadikisto Christian Rivière.

Ĉu el via lerneja tempo vi rememoras traktadon de geometrio? Certe vi iam aŭdis pri mediano, bisekcianto aŭ alto. Sed, verŝajne, ne ĉiu el vi konas tiujn vortojn en Esperanto.

Inter la traktitaj matematikaj temoj, estis pluraj matematikaj teoremoj, kiel la teoremo de Pitagoro, kiun ni diversmaniere pruvis. Ni studis fenomenojn rilate al la ora nombro kaj diversajn aplikadojn de nombroserioj kiel la triangulo de Pascal. Ni tuŝis ankaŭ aliajn temojn el trigonometrio, analitiko kaj logiko, kiujn ni rememoris el lerneja tempo. Sed ĉi-foje ili estis pritraktataj en Esperanto.

El la lingva vidpunkto estis analizataj krom matematikaj esprimoj ankaŭ la vortfarado en Esperanto kaj la lingva redundanco. Matematika logikscienco utilas por kategoriigi la diversajn eblajn rilatojn inter frazoj, sed tio ĉi-okaze iom tro detaligus nian rakonton kaj al multaj legantoj estus eble “tro seka pano”...

Kompense al la kelkfoje iom elĉerpa dumtaga programo, dum la vesperaj horoj ni ĝuis prezentojn de versaĵoj kaj muziko per multspecaj instrumentoj.

Martin Meyer, Benno Frauchiger
adaptis **Bert Schumann**

Semajnomeze en Prenzlau

Denove invitis Edeltraut Henning en sian urbon Prenzlau, kaj esperantistoj el Finnlando, Pollando kaj Germanio 9 jun sekvis la vokon al la Schützenhaus (pafista domo-restoracio).

Ĉi-foje la prezentado de literaturaĵoj estis grava programero. Prezentiĝis libroj seriozaj kaj distraj. Lige kun la prezento de la libro *Germanaj bieroj kaj bierkulturo* de Harald Schicke okazis eta ekspozicio pri bieroj kune kun plej diversaj hanapoj kaj glasoj.

Post la tagmanĝo ni komune iris al la dominikana monaĥejo. Tie troviĝas tre interesa muzeo kaj koncertejo. Dank’ al Edeltraut ni havis lertan ĉiĉeroninon. Sekvis eta rondiro al la centro de Prenzlau. Tra bela urba parko ni reatingis la Pafistan Domon kaj ĝue kafumadis.

Ĉar multaj bedaŭris, ke ili ne povis veni pro tio ke la aranĝo okazas semajnomeze, estas dezirinde, ke oni sekvontfoje renkontiĝu sabate.

Ronald Schindler

Munkeno invitas

Dum la unuaj tri semajnoj de aŭgusto en Munkeno denove okazos Mini-Munkeno — la plej granda infanludurbo en la mondo kun preskaŭ 16 mil partoprenantoj entute. En la kadro de la Comenius-universitato (altlernejo nur administrata de infanoj 8–16-jaraj ni ankaŭ ĉi-jare ofertas Esperanto-lecionon dufoje. Nia dua projekto estas *Kiujn lingvojn parolas Mini-Munkeno?* Helpantoj, prefere junaj, kaj vizitantoj estas bonvenaj!

18 sep la Esperanto-Klubo de Munkeno aranĝos festeton, lige kun projektoj en Afriko kaj Brazilo. Estas planitaj koncertoj. 19 sep ni rigardos grandan folkloran manifestacion sur Esperanto-placo.

✉ info2@esperanto-muenchen.de
www.esperanto-muenchen.de

Fritz Hilpert

Printempo en Herzberg

La ĉi-jara printempo en Herzberg estis malvarma. La vintro longe ne volis forlasi ĝin. Varmetaj tagoj aperadis nur de tempo al tempo, sed kiam okazis gravaj urbaj eventoj, la vetero favoris ilin. Tiel estis precipe dum la du gravaj majaj festoj: la kastelmuzea jubileo kaj la pafista festo.

Dimanĉe, la 9an de majo, la muzeo en Welf-kastelo en Herzberg festis la 25-jaran jubileon. Kadre de la jubilea evento ankaŭ la Esperanto-Centro prezentis sian ekspozicion. Estis preparitaj tri tabuloj: du pri la Esperantaj eventoj, okazintaj en la kastelo, kaj unu pri la Esperantlingvaj varbiloj, reklamantaj la kastelon.

Dum la jubilea programo okazis renkontiĝo kun Heinrich Julius von Hannover, la princo, kiu jam ne plu vivas en la kastelo, sed kiu regule vizitas ĝin dum gravaj eventoj.

La 22an de majo sur la ĉefplaco de Herzberg komenciĝis Schützenfest (Pafista festo). La dirigento de la loka orkestro salutis la lokan pafistan klubon kaj la loĝantojn ludante belan muzikon. Poste el la membroj de pafistaj kluboj formiĝis la irantaro kiu tramarŝis la ĉefstraton ĝis Jues-parko, direktiĝis al la monumento pri la Dua Mondmilito kaj plumarŝis ĝis la urba ĉefplaco, kie en apuda restoracio la klubanoj komune vespermanĝis. Sekvatage (dimanĉe) tra la urbo marŝis multkolora procesio de lokaj asocioj, kluboj, lernejoj kaj societoj. Fronte de la procesio, gvidata de pafistoj, troviĝis ankaŭ la urbestro.

Dum lundo, kiu estis destinita al infanoj, tra la urbo pasis la procesio de infanoj belege vestitaj. Ilin akompanis muzikistoj ĝis la festa placo, kie ili gaje ludis. Marde posttagmeze la loĝantoj amasiĝis sur la granda foirplaco, kaj dum la vespera festo ili povis admiru piroteknikaĵojn. Sabate, la 29an de majo, estis la fina festo, dum kiu oni proklamis la pafistan reĝon, elektitan pro siaj tutjaraj pafistaj poentoj. Vespere ĉiuj komune pasigis la tempon manĝante, babilante, kantante kaj dancante.

Valoras jam plani restadon en Herzberg dum tiu tempo, por travivi neforgeseblajn momentojn kaj por partopreni la belan tradicion.

Valoras ankaŭ eluzi vian viziton al Herzberg por malstreĉiĝi kaj ĝui la promenvojon "Akvo-8", kiu kunligas la naturajn kaj kulturajn valorojn ĉe la idiliaj bordvojoj. La trankviliga rondvojo ofertas ripozbenkojn kaj ekzistas ludeblecoj por junaj kaj maljunaj homoj.

La "blua gutto" estas la rondvoja indiko kie estas ĉirkaŭ 30 informtabuloj kun resumaj tekstoj en Esperanto.

Mi dankas al mia amikino Erika Weigmann, kiu akompanis min dum skribado pri la eventoj kaj ĉiam volonte respondis miajn demandojn.

Malgosia Komarnicka

Pécs: Pentekoste kaj publike

En la hungara urbo Pécs, unu el la tri ĉi-jaraj Eŭropaj kulturaj ĉefurboj, je la Pentekosto (24 maj 2010) realiĝis sukcesa publika esperantista rendevuo, kiu konsistis el pluraj programeroj.

En la Esperanto-Muzeo Gyula Lajos, protektata de la emerita abato-parokestro kaj esperantisto Pál Kele, okazis prelegoj kaj fotoprezentadoj.

Sekvis inaŭguro de la renovigita parko Esperanto, dum kiu kantis en Esperanto la 41-membra junulara koruso de la lernejo Mathias Rex, kaj solene parolis reprezentantoj de pluraj Esperanto organizoj. Sekvis florkronado en la parko ĉe la bronza bareliefo de Zamenhof kaj ĉe la Esperanto Memormuro, sur kiu troviĝas 12 granitaj memortabuloj kun la nomoj de forpasintaj, landaj kaj lokaj prestiĝaj esperantistoj.

Kunfestis en parko entute ĉ. 85 personoj. Post la inaŭguro de la parko okazis Esperantlingva meso en la urbocentra preĝejo, kie kantis la junulara koruso en Esperanto.

Grupa fotado antaŭ la urbocentra preĝejo kaj komuna tagmanĝo en restoracio fermis la feston.

Laszló István Tóth



La Pentekosta grupfoto en Pécs

Nova IFEF-prezidanto

La 62a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso okazis 8–15 maj 2010 en Sofio kun 136 partoprenantoj el 18 landoj.

Post la sinsekvaj sep trijaraj mandatoj de d-ro Romano Bolognesi, s-ino Rodica Todor, profesia psikologo laboranta por la fervojkompanio en Rumanio, estis elektita kiel prezidanto de IFEF. Ŝia unua IFEK estis en Kvinkirko/Pécs (1995); de 2001 ŝi gvidas la rumanan sektion de IFEF, kaj en 2005 organizis la kongreson de IFEF en Braŝovo.

La ceteraj novaj estraranoj estas Sylviane Lafargue (Francio) kaj Vito Tornillo (Italio); en la estraro restas la sekretario-kasisto Laurent Vignaud (Francio). Vakas la posteno de redaktoro de *Internacia Fervojisto*.

HeKo

Budapeŝto: Kajo Langlet

(Ret-Info). La hungaria fondaĵo Carl Lutz en 2005 faris peton al la ĉefurba konsilio renomi la kajojn apud la rivero Duna en Budapeŝto omaĝe al la martiroj kaj herooj, kiuj savadis la persekutatojn dum la sagokruca teroro en 1944.

3 jun 2010 la ĉefurba konsilio nomumis la kajojn en la urboparto Buda inter la pontoj Szabadság kaj Petőfi per la nomoj de la esperantistaj geedzoj Valdemar kaj Nina Langlet, pri kies homsavada agado oni povas legi la studon de Rátkai Árpád:

<http://www.esperanto.hu/egyeb/langlet-eo.doc>

Unufraze

★ Brazila parlamentano Andreia Zito denove prezentis al la parlamento sian favoran raporton pri instruado de Eo, kiu estos unue voĉdonita en komisiono. (James Rezende Piton)

★ Giorgio Silfer k Mariangela Varese partoprenis kiel observantoj de la E-Civito la 10an Ĝeneralan Asembleon de la Organizo de Nerepresentataj Popoloj 27-28 maj en Romo. (HeKo)

★ En majo estis defenditaj tri studentaj diplomaj verkoj pri Eo: *Eo en Ĉeĥoslovakio 1945-1970* de Eliška Votýpková ĉe la Karola universitato en Prago; *Periodaĵoj en Eo* de Dmitrij Ševĉenko ĉe la Universitato de amikeco inter popoloj en Moskvo; *Propedeŭtika rolo de Eo en lernado de la germana lingvo* de Arina Osipova ĉe la Urala ŝtata pedagogia universitato en Jekaterinburg.

★ Ĉi-semestre okazis du distancaj E-riklataj kursoj en la Stokholma universitato: “Enkonduko al Eo” k “Interlingvistiko kaj konstruitaj lingvoj”. (Hokan Lundberg)

★ La muzikeldonejo EMI relanĉas kanzonojn de la fama kanzonistino Dolores Duran; kelkajn malnovajn registrojn ŝi faris en pluraj lingvoj, inkluzive de Eo. (BEL Informas)

★ En Berna kvartalo Wankdorf ekfunkciis restoracio *Esperanto* ĉe Winkelriedstr. 42. (HeKo)

★ 22-29 maj kadre de la Projekto *Lernado dum la tuta vivo* de Grundtvig-programo (subtenata de EU) Katalin Kováts gvidis intensan programon por trideko da polaj k slovakaj partoprenantoj de la projekto en la sudpollanda vilaĝo Rytro. (www.edukado.net)

★ 15 jun en Malago estis fondita la Ea Naturamikaro (ENA) kun tripersona provizora komitato (prez. Julio Herrero, vicprez. Ángel Arquillos; sekr. Mariangela Varese), kiu intencas eldoni *La Migranton* kun almenaŭ unu 100–150-paĝa kajero jare. (HeKo)

★ ILEI kunlabore kun E@I k aliaj partneroj eldonos la gramatikon pretigitan de Bertil Wennergren por la retkursanoj ĉe lernu.net; ĝi estas koncizigita versio de PMEG. (Stefan MacGill)

★ Per monokolekta kampanjo KAEM aligis al UEA 154 e-istojn el neriĉaj landoj de Azio: Afganio 1, Azerbajĝano 1, Bangladeŝo 1, Barato 1, Ĉinio 43, Filipinoj 3, Indonezio 11, Kamboĝo 1, Laoso 1, Mongolio 5, Nepalo 9, Pakistano 22, Srilanko 5, Tajlando 1, Turkio 1, Uzbekio 1, Vjetnamio 43. (*Esperanto en Azio*)



Laŭreatoj de Kostrena 2010 (Fotis: Boris Di Costanzo)

Kroataj lernejoj konkursis pri la plej bona kono de Esperanto

Jam la naŭan sinsekvon jaron estis organizita konkurso pri scio de Esperanto por lernantoj el elementaj, ok-klasaj lernejoj de Kroatio. Ĉi-jare la konkurso okazis 21–23 maj en la skolta ripozejo *Esperanto-Domo* en la marurbeto Kostrena. La konkurso partoprenis 16 gelernantoj el kvin elementaj lernejoj. Gelernantoj faris skriban ekzamenon kaj konkursis en la kategorioj A (komencantoj) kaj B (progresantoj).

En la **kategorio A** la unua premio ne estis donita, la duan premion ricevis Ana Jurelinac el la elementa lernejo (EL) *Mladost* el Zagrebo, kaj la trian premion ricevis Ružica Ĉutuk (EL) *Nikola Hribar*, Velika Gorica). En la **kategorio B** estas laŭditaj: Emil Hrvatini (EL) *Andrija Mohoroviĉ*, Matulji), Anamarija Hramina (EL) *Mladost*, Zagrebo) kaj Dorotea Knežević (EL) *Mladost*, Zagrebo). Per la **Pokalo Kostrena 2010** oni premiis la elementan lernejon *Retkovec* Zagreb, kiel la plej bonan lernejon.

La plej sukcesaj lernantoj ricevis diplomojn kaj pokalojn. Ĉiuj lernantoj ricevis donace lernolibron de Esperanto. Gelernantoj kaj iliaj gvidantoj vizitis planetarion en Rijeka. Krome okazis renkontiĝo de Esperanto-prelegantoj.

La konkurson organizis Kroata Esperanto-Ligo, Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto kaj Esperanto-Societo Rijeka. Aktualajn informojn pri la konkurso oni povas trovi en la retpaĝoj www.esperanto-rijeka.hr kaj www.esperanto.hr.

Tea Radovanović

Tago de Pioniro omaĝe al d-ro Lee Chong-Yeong

15 maj Korea Esperanto-Asocio (KEA) festis la 12an Tagon de Pioniro en la Kyungbook Ŝtata Universitato en Daegu. En la festo, kie oni honoris la karmemoran d-ron Lee Chong-Yeong (1932–2008), partoprenis 85 homoj inkluzive de familianoj kaj universitataj kolegoj de d-ro Lee.

Ekde 1999 KEA ĉiumaje celebras la Tagon de Pioniro kaj eldonas memorlibron por la elektita pioniro en la korea Esperantujo. Kiam d-ro Lee Chong-Yeong, iama prezidanto de KEA (1994–95, 1998–2001) kaj de UEA (1995–1998) forpasis (4 jul 2008), KEA faris la funebran ceremonion kaj organizis eldonkomisionon de la memorlibro: Kim Uson, Choe Taesok, Song Ho-young.

La eldonkomisiono kolektis artikolojn, kiujn d-ro Lee kontribuis al Esperanto-gazetoj kaj memorverkojn de liaj amikoj, samlernejoj kaj laborkolegoj. La materialon oni dividis laŭlingve en du volumojn — la unua, *Lee Chong-Yeong, gvidanto nia* (Esperanta), aperis je la unua datreveno de lia forpaso (4 jul 2009); kaj la dua, *Keunseuseung Hyangchon Lee Chong-Yeong* (korea), je la Tago de Pioniro.

En la Tago memorparolis Park Wha-Chong (prezidanto de KEA). Pri d-ro Lee rememoris liaj amikoj, universitataj kolegoj kaj Lee Jung-kee (prezidanto de KAEM). Kim Uson raportis pri la libro kaj pri ties redaktado. Lee Sung-il, filo de d-ro Lee kaj la prezidanto de la kompanio Pizza Hut en Koreio, dankis la kontribuojn de la memorlibro. La ĉeestantoj estis regalataj de la familio de d-ro Lee per koreaj manĝaĵoj kaj picoj en la tagmanĝo.

Kim Uson

Belga ekzemplo de disfalo

Dafydd ab Iago el Bruselo

Membroj de la Eŭropa Parlamento, diplomatoj kaj ĵurnalistoj en Bruselo kutimas je glata sinsekvo de prezidantecoj en la Eŭropa Unio (EU). Ne ĉi-foje. Belgio, kunfondinto de EU, nun frontas la plej gravan krizon de sia ekzisto. Post la junia voĉdonado politikistoj de la du ĉefaj komunumoj, franclingva kaj nederlandlingva, malfacile kunlaboras. Malfeliĉe por Eŭropo, Belgio ĝis la jarfino prezidos la Konsilion de EU.

Belgaj oficistoj ne kaŝas ke, sen elektita registaro, ili malfacile povos konvinki aliajn ŝtatojn-membrojn akcepti eŭropajn kompromisojn. Kutime, la prezidanteco de EU sekurigas ke la ŝtatoj-membroj akceptas kompromisojn negocitajn kun la Eŭropa Parlamento surbaze de proponoj de la Eŭropa Komisiono. Al belgaj ministroj, kiuj la 13an de junio malgajnis la balotadon kaj serĉas aliajn laborpostenojn, mankas entuziasmo por siaj malnovaj laboroj. Aliflanke, la ceteraj ŝtatoj-membroj malpli akceptas proponojn verkitajn de la “fiaskintaj” aŭ “nelegitimitaj” ministroj de la portempa registaro.

Belgio ne baldaŭ havos novan registaron. Optimisme, la gajnintoj esperas starigi novan registaron en septembro 2010. Tio signifus, en la plej bona kazo, ke almenaŭ triono de la sesmonata belga prezido de la Konsilio de Eŭropo estos senregistara. Multaj observantoj kredas, ke Belgio bezonos pli da tempo por starigi novan registaron. Post la voĉdonado en 2007, la politikaj partioj bezonis 294 tagojn por starigi registaron.

Belgio disfalas malrapide sed certe. La ĉefo de la Nova Flandra Alianco (NFA), Bart De Wever, malferme diras, ke li volas, ke Belgio malaperu. Tamen li estas sufiĉe inteligenta por ĉiam substreki, ke la sendependa Flandrio venos nur post jaroj de negocado kun la franclingva Belgio.

NFA venkis en junio kun ĉ. 30% da flandraj voĉoj. Unuafoje, malferme sendependista partio gajnis la plej grandan nombron da voĉoj en Flandrio. NFA volas, ke Belgio unue evoluu al konfederacio. La centra ŝtato respondecu nur pri la defendo kaj eksterlandaj aferoj. Kaj la konfederacio post iom da tempo povos malaperi. Tiel Flandrio iĝus sendependa ŝtato.



Konstrui Eŭropon ŝajnas pli facile ol pluteni Belgion. (Foto de la Eŭropa Komisiono)

Aliflanke de la lingva muro, en Valonio, gajnis la franclingvaj socialistoj. Kvankam Belgio frontas gravegan buĝetan deficiton, la socialistoj volas altigi la sociajn elspezojn. Belgio nun ŝuldas ĉirkaŭ 340 miliardojn da eŭroj, do — sian malnetan enlandan produkton por unu jaro. Sen registaro ĝi ne povas redukti la buĝetan deficiton kaj tiel riskas la samajn financajn atakojn, kiujn suferas Grekio. Spite al tiaj problemoj, la Socialista Partio gajnis ĉ. 37% da voĉoj en Valonio per politika programo promesanta pli da elspezoj.

La politikaj elitoj en Belgio ŝajne komencas akcepti, ke ili devas reformi la ŝtaton. “La rezulto de la voĉdonado en Belgio povas esti vidata de la internacia komunumo kiel granda problemo. Tamen la realeco estas tute alia, — diris Elio di Rupo, ĉefo de la valonaj socialistoj. — Mi estas konvinkita, ke ni atingos akcepteblan kompromison kaj ekvilibrantan institucian akordon. Ni faros ĉion por stabiligi nian landon”.

Aliflanke, Bart De Wever komprenas ke, oferante la poston de la ĉefministro al la plej granda franclingva partio, li gajnos iom da fido en la suda parto de la lando. Tamen De Wever estas ankaŭ memorata kiel homo kiu diris: “Estas multe da simpatiaj valonoj, sed ŝajne mi neniam ilin renkontas”. Tiaj citaĵoj longe restas en la kapoj de franclingvaj belgoj.

Blinda pafado

Hans Eichhorn, psikiatro, blinde pafis kaj maltrafis (*La Ondo*, 2010, №6, p. 11): liaj spekulativoj atestas strangan nescion aŭ totalan ignoron.

1. Kiel oni povas (mis)uzi terminojn “en kalumnio, respektive, ofenda maniero”?

2. Artur E. Iltis estas mia nomo artista uzata de 1968 kaj registrita en mia legitimilo, kiel legeblas en baldaŭ aperonta libro pri la historio de Iltis-eldonejo. Ĝi havas nul rilaton kun “putoro”.

3. Mi parolis pri “uretra tipo” apogante min sur konstato de Tazio Carlevaro. Eichhorn sekve devus fakumi kun sia tiĉina kolego ĉi-teme. Desegnaĵo de Friedrich Dürrenmatt *La senhonorigita Minotaŭro* (1958) klarigas la situacion: ankaŭ oratoro de sia piedestalo pisas sur sian publikon...

4. Io lasta: antaŭ ol la psik-analizo terminigis vortojn kiel narciso, edipa komplekso k. a., ili sidis en la mitologio kaj en la literaturo, sekve estis pli universale konataj ol tra la fakulaj terminaroj. Jen kial Freud, ĉe la lego de *Songeskoj* de Schnitzler tiris la ĉapelon ekkonante, ke la poeto venas al samaj konkludoj, nur ali-maniere.

Si tacuisses...

Reinhard Haupenthal

Leterkesto

Lastatempe mi kun profunda emo legis la tutan libron *La ĉeriza ĝardeno* kun rakontoj, noveloj kaj dramoj de la grandega Ĉehov (dufoje mian amatan *La damo kun hundeto*, kies filmversion mi ĝuis du fojojn danke al grandiozaj rusaj geaktoroj). Imponas ankaŭ la flua, klara Esperanto en la libro. Nun mi petegas la eldonantojn en Kaliningrado, ke ili subtenu mian entuziasmon, “flamon”, por plua legado de viaj tradukoj de grava rusa literaturo...

Ĝus en la konata saksa kuraĉloko Bad Elster mi aŭskultis kozakan virkvarteton, kiu kantis ege ĝuplene rusajn popolajn kaj religiajn kantojn; i.a. ili tre sindone prezentis la fame korduŝan *Veĉernij zvon*.

Bertlin Englund (Germanio)

Agnieszka Rzetelska sur la kovrilo de la junia kajero de *La Ondo* fariĝas stelulino, gratulon! Nu, nesurprize, fakte, ĉar pri ŝia agado mi informiĝis jam kiel mem ankoraŭ freŝbakita esperantisto, kiam pri ŝi oni raportis en iu numero de *La Ondo de Esperanto* kiel pri la eble plej juna Esperanto-instruistino en la mondo!

Marek Blahuš (Ĉeĥio)

KOMPUTILE

Interesaj retejoj en Esperanto

ESPERANTO.COM — NIA KOMUNUMO

<http://esperanto.com>



Se vi estas ŝatanto de sociaj retejoj kiel Facebook, MySpace ks., certe ĝojigos vin apero de nova socia reto ĝuste por esperantistoj. Post Amikumu.com el la jaro 2007, kiu ne plu estas funkcia, venas la dua provo — Esperanto.com, virtuala komunumo, kreita “de esperantistoj por esperantistoj”.

La retadreso “esperanto.com” estis longe posedata de usona privatulo, tamen unu el nunaj teamanoj de la socia reto, usona esperantisto, aĉetis ĝin de li kontraŭ sufiĉe alta prezo. La retejo tuj de sia komenco kaptis intereson de esperantistoj. Kvankam hodiaŭ ĝi funkcias ankoraŭ kiel beta-versio, jam preskaŭ 1200 uzantoj registriĝis, kaj la komunumo daŭre kreskas. Krom tio, ke ĝi enhavas tipajn funkciojn de socia reto, ĝi bone funkcias ankaŭ kiel internacia kalendaro de Esperanto-eventoj, en kiun rajtas ĉiu membro aldoni novan aranĝon kaj atentigi pri ĝi tiamaniere la vastan komunumon.

MOJOSE

<http://mojose.wordpress.com>

La retpaĝo dediĉita al — kiel jam la titolo mem malkovras — novaĵoj por Moderna, JunStila generacio. Ĝi estas blogo pri ideoj kaj produktoj sur la kampoj de arto, modernaj teknologioj, kulturo, vojaĝado, ekonomio... La blogaĵoj estas ordigitaj en 16 kategoriojn. Aŭtoroj zorge elektas nur tiajn kontribuojn, kiuj estas inspiremaj por juna generacio. La paĝaro funkcias ekde junio 2008 kaj krom artikoloj ĝi enhavas ankaŭ detalan klarigon de historio de la vorto “mojosa”. Simple mojosaj retpaĝoj!

KIBERIO

<http://www.kiberio.com>

Kiberio estas esperantlingva blogsfero, verko de Manuel Ortega, kiun ni konas el elektolupo.com. Temas pri kolektado de RSS-fluoj de ĉiuj eblaj esperantlingvaj blogoj. Sur la paĝo troviĝas nuntempe 63 diverstemaj blogoj, kio estas je 14 blogoj pli multe ol en e-planedo.kerno.org. Ĝi ebligas rapidan trarigardon de la tuta blogsfero kaj elekton de tiu artikolo, kiu interesas nin, per klako sur ĝi. Per la maldekstra supra menuo eblas aperigi aŭ ĉiujn blogojn, aŭ blogojn laŭ la servilo, de kiu la blogo devenas. *Kiberio* estas kreita per la sistemo feevy.com.

LIVERA FOLIO

<http://liverafolio.wordpress.com>

<http://twitter.com/liverafolio>

Ne, ni ne faris tajperaron. Ĉi-foje ni ne pensas pri la sendependa movada bulteno *Libera Folio*, kvankam jena retejo rilatas al ĝi. En ĉi tiu parodia retejo, kiu “liveras la plej freŝajn novaĵojn” el Esperanto-mondo, ni povas ekscii i. a., ke “viro lernas Esperanton por povi kabei poste” aŭ ke “Katalin Kováts anstataŭos Halle Berry kiel nova Bond-knabino”. La paĝaro ankaŭ informas nin, ke finfine reaperis la karavano, kiu perdiĝis post IJK en Vjetnamio kaj alportas intervjuon kun ĝiaj ĉeestintoj; ankaŭ avertas antaŭ la eraro en Esperanto-traduko de *Kamasutro*, kiu kaŭzas centojn da vundiĝoj. Kio sekvas en estonteco? Jam aŭdiĝas proponoj pri *Rivela* kaj *Ribela Folio*...

ESPERANTO — EDZPERANTO

<http://www.edzperanto.org>

Ne vane oni diras, ke Esperanto kunigas homojn. Multaj esperantistoj trovas eĉ sian vivpartneron ĝuste per la internacia lingvo. Por helpi ĉi tiun interesan fenomenon ekestis jena paĝaro — la unua interreta Esperanta konatiĝ-servo. En januaro 2010 finiĝis testa fazo de la projekto kaj ĝis hodiaŭ jam aliĝis kelkdek interesiĝant(in)oj — plejparte viroj. Baza uzado de la paĝaro estas senpaga, tamen por nelimititaj mesaĝoj kaj pli da fotoj/videoj oni devas pagi aŭ alimaniere helpi pluan evoluon de la paĝaro.

LA BLOGO DE MARK FETTES

<http://www.ipernity.com/blog/56240/home>

1 jun 2010 lanĉis sian blogon la freŝe elektita B-komitato de UEA, Mark Fettes. Laste li estis komitatano (kaj estrarano) en la jaro 1998. La ĉefa temo kaj kialo de ekesto de la blogo estas la movado. Laŭ aŭtoro mem ĝi ekestis “por malfermi komunik-kanalon el tiu esperantista popolo, kiun mi klopodos reprezenti digne kaj iniciateme en la centraj rondoj de UEA dum la venontaj jaroj”.

En liaj artikoloj ni trovas ekz. komparon de la strukturo de UEA kun la famaj “vilaĝoj de Potemkin”, meditado pri la pesimismom vekanta lasta numero de la revuo *Esperanto*, aŭ pri la (ĉi-tempe ofta) demando, ĉu organizo kiel UEA en nuna epoko fakte ankoraŭ necesas.

ESPERANTO TRA LA MONDO

www.esperanto-tra-la-mondo.net

Ĉi tiu retejo ambicias iĝi vasta katalogo de Esperanto-retpaĝoj el la tuta mondo. Nuntempe estas ligiloj ordigitaj en 8 ĉefajn kategoriojn kaj bonvena estas helpo de vizitantoj kun aldonado de novaj ligiloj, atentigoj pri eraroj aŭ “mortaj” ligiloj. La katalogon prizorgas la franca asocio Nord-Okcidento.

TELESKOPO

<http://teleskopo.com>

Teleskopo estas internacia scienca revuo, kiu aperas rete ĉiun jaron kaj publikigas en Esperanto fakajn artikolojn el la plej diversaj sciencaj branĉoj: historio, lingvoscienco, epistemologio, matematiko, medicino kaj pluraj aliaj. La revuo estas oficiale registrita ĉe Brazila Instituto pri Scienco kaj Teknologio, ekde 1 maj 2009 ĝi havas sian ISSN-numeron. Ĉefredaktoro de la revuo estas Dominique Vieira, doktoriĝanto pri historio el Brazilo.

La retejo estas atentinda klopodo pri antaŭenigo de la scienca uzo de Esperanto, do havas similan celon kiel, ekzemple, la aranĝo KAEST okazigota de E@I ĉi-novembre en Slovakio.

Katarína Nosková, Marek Blahuš

The cover of the journal 'Teleskopo' features a telescope on a tripod in the top left corner. The title 'TELESKOPO' is prominently displayed in large, bold, black letters. Below the title, it says 'Internacilingva Scienca Revuo'. The ISSN number 'ISSN 1964-7874' is in the top right. The date 'Vendredo, 11 de Junio de 2010' is at the bottom right. A navigation bar at the bottom left includes links for 'Ĉefa paĝo | Eldonoj | Redakta Komitato | Alvoko al verkistoj | Kontaktdresado'. The main text on the cover describes the journal's mission and lists some of the articles included in this issue, such as 'Teleskopo estas scienca revuo aperanta surrete por publikigi internacilingve artikolojn pri diversaj sciencaj fakoj' and 'La revuo Teleskopo ankaŭ ricevas artikolojn pri epistemologio, historio kaj filozofio de la scienco'.

Notoj de maljuna grumblulo pri REK-26

La teatro komenciĝas de la vestejo. Same la kongreso komenciĝas de la *Kongresa libro*. Mi naive opiniis, ke celo de la *Kongresa libro* estas helpi al kongresanoj dum la kongreso. Sed ŝajnas, ke ĝi estis kompilita speciale por kaŝi la tutan utilan informaron pri la kongreso. Ni analizu ĝin laŭrubrike.

En la unua, historia rubriko oni povas trovi eĉ adresojn de preskaŭ ĉiuj lokoj, kie estis kunsidoj de REK antaŭ cent jaroj, sed la adreso de la nuna kongresejo tute mankas (krom la aludo sur la lasta kovrilpaĝo — verda steleto apud la metrostacio).

Post nemultaj salutvortoj sekvas la plej granda rubriko — priskribo de la salonoj de la kongresejo. La titoloj de artikoloj parolas pri tio: Saharov-salono, Borovko-salono k.t.p. Sed en ĉi tiu rubriko pri salonoj ne estas eĉ unu vorto; kie ili lokiĝas, sur kiu etaĝo, ŝajne estas ŝtata sekreto. En la sekva rubriko estas kelkaj “tre gravaj” informoj pri la salonoj — kvanto da sidlokoj kaj tabloj (strange, ke ne kvanto de fenestroj kaj kvalito de planko). Sed la lokiĝo kaj etaĝo ankaŭ tie mankas.

La sekva rubriko, la programo, estas prezentita per la plej maloportuna maniero — laŭ la salonoj. Por elekti la plej interesan programeron el kelkaj samtempaj, oni devas ĉiufoje tralegi la tutan programon anstataŭ unu aŭ kelkajn apudajn liniojn.

La sekva rubriko, la organiza komitato, estis farita tre bone, eĉ kun belaj fotoj, kiuj helpis al mi trovi la prezidantaron de OK. Mi demandis ŝin pri lokiĝo de vica programero, sed ricevis respondon ke ŝi tion ne scias, ĉar ŝi respondecas pri la kongreso entute. Bedaŭrinde inter la respondeculoj de OK mi ne trovis respondeculon pri informado.

Uzi la lastan rubrikon, la liston de la partoprenantoj, estas tre maloportune, ĉar ĝi estas organizita per nekonata principo (nek laŭlande, nek laŭalfabete), aŭ simple senprincipe.

Miaj riproĉoj al la Kongresa libro estus superflujaj, se la informado dum la kongreso estus plena kaj ĝustatempa. Tamen ĝi estis kaosa kaj neoportuna. Ĉiuj ŝanĝoj en la tagordoj estis reflektitaj sur papereto pendigita en nebone lumigita loko en la unua etaĝo. La organizantoj pro nekonata kaŭzo ne povis kopii ĝin kaj pendigi apud ĉiuj salonoj, ŝparante la tempon al ĉiuj ĉeestantoj kaj evitante la malfruigon al komenco de vica programero.

La originaleco de la kongreso konsistis ankaŭ en tio, ke dum la solenaj inaŭguro kaj fermo ne sonis la Esperanto-himno! Mi mem ne tre ŝatas, kiam amaso de ne tre muzikkapablaj homoj per malagrablaj voĉoj kantas longan himnon, sed unu aŭ du strofoj estas neeviteblaj en ĉiu Esperanto-kongreso.

La organizantoj devintus preni kiel modelon la sperton de multaj UKoj kaj landaj kongresoj, sed ne inventi originalan stultajon.

Vladimir Korĉagin

Pardonpeto

Invitite de la REK-organizantoj kiel preleganto, mi, post iom longa serĉado (neniu informis min pri la situo), venis al la kongresejo, kie je mia dispono ne estis la promesita projekciilo, pro kies manko mi devis improvizi prelegon aliforman. Ĉar la OK ne senkulpiĝis antaŭ la kunvenintoj por mia prelego, mi mem petas ilian pardonon pro la fuŝoj, pri kiuj ne mi kulpis. Dum la lasta jardeko mi partoprenis neniun esperantistan kunvenon en Ruslando ekster Kaliningrado. Post la Peterburga fiasko mi decidis ne plu akcepti invitojn de REU kaj REK.

Aleksander Korĵenkov
kiu ne ricevis la *Kongresan libron*

Schleyer-Biblioteko savita

Unu el la handikapoj por verki detalan scienca biografion de Zamenhof konsistas el tio, ke mankas la dokumento-baza materialo: gravaj korespondoj, ne nur la antaŭesperanta, sed ĉiuj ricevitaĵoj leteroj, same kiel lia biblioteko privata kiu permesus konkludojn precipe pri liaj legajoj pri la juda demando.

Pro tio estas eta miraklo, ke, preskaŭ cent jarojn post lia morto, la privata biblioteko de Johann



Martin Schleyer (1831–1912) saviĝis. Komence de la 1920aj jaroj ĉi biblioteko estis transprenita de la svisa volapükisto Jakob Sprenger (1872–1951) kaj ekspluatita ĉefe de Johann Schmidt (1895–1977). La biblioteko de ĉi lasta estis vendita divers-direkten: al CDELI, al IEMW, al la subskribinto kaj al la industriisto Hanns Martin Schleyer (1915–1977), pranevo de la prelato kaj viktimo de germanaj teroristoj. Post la morto de Sprenger li reaĉetis komence de la 1950aj jaroj de ties filino la tutan bibliotekon de sia praonklo kaj dum jar-dekoj ĝin gardis en sia domo en Stuttgart. Kiam mortis lia vidvino Waltrude en 2008 la filoj devis dissolvi la gepatran domon kaj kontaktis la subskribinton, kies agado en la Prelato-Schleyer-Komitato estis konata al ili. En februaro 2010 la biblioteko estis transprenita en Stuttgart kaj transportita al Malaucène kie ĝi nun estas registrata por estonta katalogo.

Okazas intertraktoj kun unu el la plej gravaj bibliotekoj germanaj por ke la Schleyer-biblioteko tie deponiĝu kiel *corpus separatum* kaj servu por estontaj esploroj. La biblioteko enhavas, krom verkoj pri lingvistiko, teologio kaj aliaj sciencaj fakoj, ankaŭ la 23 tag-librojn de Schleyer de 1863 ĝis 1912 kies faksimila eldono estus vere defia tasko por la interlingvistiko.

Reinhard Hauptenthal

7 jun 2010 forpasis

Chai Zemin (1916–2010)

fama ĉina diplomato, ambasadoro de Ĉinio en Hungario, Gvineo, Egiptio, Tajlando; la unua Ĉinia ambasadoro en Usono post la starigo de la diplomatiaj rilatoj en 1979, prezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj. Li eklernis Esperanton en la 1930aj jaroj, kunlaboris en Esperanto-gazetaro, en 1986 prezidantiĝis en la societo Amikoj de Esperanto kaj sur sia posteno energie antaŭenpuŝis Esperanto-movadon en Ĉinio.

14 jun 2010 en Klaipėda post longa malsano forpasis

Viktoras Baniulaitis (1917–2010)

inĝeniero kaj esperantisto (ekde 1966), kunfondinto de la Esperanto-klubo en Klaipėda (1968), kiun li dum pluraj jaroj sekretariis aŭ prezidis, peranto de SAT por Sovetunio kaj Litovio, kolektanto de esperantaĵoj, Esperanto-instruisto, ŝakisto.

Ni funebras kaj kondolencas.

Paĝoj el la historio de la Sukcena Lando (15)

de Halina Gorecka

Albertina: de la scienca provinco al avangarda scienco

Dum pli ol du jarcentoj la Kenigsberga universitato estis ordinara germana superlernejo. Ĝin stampis la provinceco kaŭzita de la foreco dis de la pli evoluintaj regionoj de la centra Germanio. Ĝis la fino de la 18a jc. la ĉefaj universitataj studobjektoj estis teologio, juro, filologio kaj medicino, kiujn oni instruis en la “altaj” fakultatoj. Filozofio kaj natursciencoj subiĝis al teologio; matematikon kaj natursciencojn oni konsideris duarangaj. Tiutempaj universitatoj celis liveri al la ŝtato oficistojn kaj praktikajn fakulojn, kaj al la eklezio — pastrojn.

Nesufiĉa financado, mizera provizo de la katedroj, manko de scienca literaturo, malaltaj salajroj de la profesoroj markas la universitatan ekzistadon ĝis la unuaj jardekoj de la 19a jc. En 1806 en Albertina studis nur 332 studentoj, el ili 101 teologoj, 220 juristoj, 8 medicinistoj; en la filozofia fakultato, en kiu oni studis matematikon kaj la natursciencojn, estis nur tri studentoj.

La renovigo de la Kenigsberga universitato komenciĝis dank’ al tri favoraj cirkonstancoj. La plej grava estis la historia, kiun difinis la Napoleonaj militoj. Unu el la postsekvaj de la patriotisma inspiro estis unuigo de la spiritaj fortoj de la lando, ĝenerala vigliĝo de la intelekta vivo. Influis ankaŭ la ideoj de la Franca revolucio alportitaj de la okupanta armeo. En la lando komenciĝis la ŝtata reformado. Pro la malvenkoj Frederiko Vilhelmo III pasigis preskaŭ du jarojn en Kenigsbergo kaj tio atentigis lin pri la bezonoj de la urbo kaj pri la plorinda stato de la universitato. La reĝo, ne sen la influo de Vilhelm Humboldt, decidis vigligi la sciencan kaj instruan agadon de Albertina.

La tria kialo estis la konateco, kiun akiris la universitato, danke al la gloro de la Kenigsberga saĝulo Immanuel Kant (Kantio). Kvankam la filozofo ne plu vivis, lia patrujo iĝis vaste konata en Germanio kaj ekster ĝiaj limoj.

Malgraŭ la militaj perturboj la Kenigsberga universitato iom post iom akiris solidan sciencan pezon, precipe en la fizikaj-matematikaj sciencoj kaj en medicino. En la juna generacio de instruistoj venintaj al Kenigsbergo la plej grava figuro estis Frederiko Vilhelmo



Bessel

Bessel (1784–1846), astronomo, geodeziisto kaj matematikisto. Veninte al Kenigsbergo en 1810, en 1813 li finkonstruis astronomian observejon, kies direktoro li restis ĝis sia morto. Li reformis la teorion kaj praktikon de la astronomiaj observoj kaj ilian prilaboron. El la observejo de Bessel la scienco ricevis precizegajn stelkatalogojn, novajn pligustigitajn valorojn de la ĉefaj parametroj, karakterizantaj la strukturon de la Sunsistemo, solvon de la ĉiama problemo pri distanco ĝis la steloj ktp. En geodezio la ĉefa laboro de Bessel estis kalkulado de la precizegaj parametroj de la figuro de la Tero, kiujn oni aplikadis dum pli ol cent jaroj. Li havas meritojn ankaŭ en matematiko. Lian nomon havas speciala klaso de transcenda funkcioj kaj lineaj diferencaj ekvacioj, kiu produktas cilindrajn funkciojn.

Bessel estis nek kabineta profesoro, nek pedanto en la ĉiutaga vivo. Al la sciencaj atingoj grandparte kontribuis la etoso de reciproka bonvolemo, kiun formis la personeco de Bessel inter la homoj ĉirkaŭantaj lin. Li havis proksimajn amikojn, multajn kolegojn kaj korespondantojn, ĝuis profundan respekton de siaj disĉiploj. Bessel ĉiam havis aktivan vivmanieron: li plezure naĝis en la maro, laboris en la ĝardeno, ŝatis promenadojn, estis pasia ĉasanto. Oni povis renkonti lin kun fosilo enmane en la ĝardeno, ĉirkaŭanta la observejon, plantita de la direktoro mem.

La matematika skolo formiĝis en Kenigsbergo danke al la aktiva agado de la junaj kolegoj kaj amikoj de Bessel, matematikisto Carl Jacobi (1804–1851) kaj fizikisto Franz Neumann (1798–1895). Laŭ reĝa ordono ili venis el Berlino al Kenigsbergo en 1826. Ĉi tie ili kreis siajn elstarajn verkojn, okupis gvidajn poziciojn en la scienco, fondis familiojn. En Kenigsbergo Jacobi pretigis sian teorion de la elipsaj funkcioj, faris esplorojn en la analiza mekaniko k.a. Neumann daŭrigis siajn esplorojn pri kristalografio, poste lin altiris fiziko de kristaloj; uzante matematikajn metodojn, li okupiĝis pri elektrodinamiko.

La amikeco de la du sciencistoj rezultigis la faman fizikan-matematikan seminarion Neumann-Jacobi, malfermitan en la loĝejo de Neumann en 1834. En la seminario unufoje en la Eŭropaj universitatoj estis enkondukita la triunueca sistemo de la studoj, funkcianta ĝis la nuna tempo: lekcio (rakontado de la teorio), seminario (ĉiufanka diskutado de la teorio kaj solvado de taskoj), laboratorio (fizika eksperimento).

Fruktodone evoluis en la 19a jc ankaŭ la medicina fakultato. Dum 17 jaroj laboris ĉi tie Karl Ernst Baer (1792–1876), la patro de embriologio, invitita el Derpt (Ruse: Jurjev; estone: Tartu). Li estis profesoro pri zoologio kaj botaniko, poste ankaŭ pri anatomio. En 1831 li estis elektita kiel prezidanto de la Fizika-ekonomia societo. Por vigligi ĝian agadon Baer proponis enkonduki publikajn prelegojn. Jam ĉe la tria prelego la vasta salono ne povis enteni ĉiujn dezirantojn. En sia *Aŭtobiografio* la observema kaj prudenta Baer priskribas ne nur la universitatan vivon, sed ankaŭ la sociajn morojn kaj kutimojn en Kenigsbergo. Li estis atestanto de la tumultoj dum la epidemio de ĥolero en 1831.

Al la medicina fakultato apartenis ankaŭ la botanika ĝardeno, kiun fondis la bopatro de Bessel, profesoro Karl Gottfried Hagen (1749–1829). Li estis ŝerce nomata “la tuta fakultato”, ĉar li instruis kvin objektojn: zoologion, botanikon, mineralologion, fizikon, kemion. El siaj propraj monrimedoj li malfermis la unuan en Germanio universitatan farmakologian laboratorion. Li fondis ankaŭ la universitatan mineralologian muzeon. La botanika ĝardeno de la universitato estis fondita proksime al la monteto Butterberg surbaze de malnova parko. (Nun la ĝardeno apartenas al lerneja ekologia centro.)

Daŭrigota

La granda kaldrono

John Islay Francis naskiĝis en 1924, lernis Esperanton dum la dua mondmilito kaj debutis en 1952 kiel unu el la kvar anoj de “la skota skolo” per la poemo *La kosmo* en *Kvaropo*. Sekvis noveloj kaj romanoj kun longaj intertempoj. Lia ĉefverko nedubable estas *La granda kaldrono* el 1978 — preskaŭ 600-paĝa kroniko pri kelkaj anoj de skota familio. Ĝi estas rakonto pri la milito, aŭ pli ĝuste pri la homoj en milito, pri iliaj diversaj sintenoj al ĝi kaj pri ĝiaj efikoj — korpaj kaj spiritaĵoj — al la homoj.

Rolas en la romano kvin ĉefaj personoj kun malsamaj sintenoj al la milito. La rakonto okazas tuj antaŭ kaj dum la du mondmilitoj. Do, temas pri du paralelaj fadenoj, kiuj aperas per alternaj epizodoj ene de ĉiu ĉefa ĉapitro. En la fina triono de la libro Francis kunplektas tiujn fadenojn.


Inter la flankaj personoj ni trovas verajn militemulojn, sed la ĉefaj roluloj, kaj multaj el la malĉefaj, ne entuziasmas pri la militoj. Tamen iliaj reagoj tre malsamas. Ni trovas veran paciston, kiu rifuzas soldatiĝi, kaj aliajn, kiuj libervole rekrutiĝas. Ĉu vere libervole? Nu, Francis klare montras, kiel limigita estas la libereco de tia elekto. La aŭtoro tre bone prezentas ankaŭ sintenojn kaj reagojn de virinoj al la militoj, kaj iliajn sociajn rolojn, kiuj grave ŝanĝiĝas dum la milita tempo.

En la unua mondmilito la militagoj mem okupas gravan parton de la rakonto. Francis prezentas ilin tre lerte, timige kaj senmaske. Li kunvenigas nin en la tranĉeojn de Flandrio kaj ne hezitas scenigi ties inferon kun persista konsekvenceco. Tiuj eroj de la romano estas grava kaj preciza dokumento pri la teruraj krimoj de la militgvidantoj. Ni travivas ĝin tute el la perspektivo de la simplaj soldatoj, la homa materialo kies karno kaj mensoj estas muelataj de la militmaŝino.

La duan militon ni apenaŭ spertas en formo de konkretaj bataloj. Jano, junulo iom nematura, pendolanta inter ciniko kaj revemo, iĝas flugisto. Lia vivo en la aerarmeo estas amplekse rakontata, tamen ni preskaŭ ne spertas verajn bataloscenojn. Rolas pli multe lia angoro kaj liaj klopodoj trakti tiun angoron, per kolero, alkoholo, malestimo al virinoj kaj ĝenerala naŭziĝo pri la vivo. Kaj same kiel ĉe la unua milito, Francis elektis apenaŭ mencii la grandajn

perspektivojn de la milito — la militon de la politikistoj, generaloj kaj postaj historiistoj. Li restas ĉe la milito de la ordinaraj homoj, soldatoj kaj civiluloj, patrinoj kaj fianĉinoj.

Francis konstruis sian verkon tre lerte kaj sukcese. Ankaŭ la detala tajlado ofte estas tre bona. La epizodoj varias laŭ longo kaj rakonta stilo. Preskaŭ ĉiu epizodo estas memstara, ne rekte ligita al alia epizodo, kvankam li ofte klopodis krei lertan transsalton de epoko al epoko, de persono al persono, sendube por emfazi la partan paralelecon de la du fadenoj. Nur du-tri foje li provis pli malfacilan metodon: miksi la du epokojn en unu sama epizodo, kun pli “glitaj” transiroj. Ĉefe tio okazas en la fina ĉapitro, kiu iomete similas konkludan epilagon, iom pli filozofian ol la ĉefa parto de la romano.



La rakonta maniero estas efika kaj bona. Kutime la perspektivo tre proksimas al la ĉefrolulo en ĉiu epizodo. Dialogoj formas grandan parton de la verko, kaj plej ofte Francis montras mirindan talenton krei vivajn, konvinkajn, realecajn interparolojn kiuj esprimas multon sen tro elokventi. Li sukcesas bone variigi la stilon de parolantoj, depende de persono kaj situacio. Eble tamen oni ne sentas klaran tempodiferencon inter la esprimmanieroj de la du epokoj. Ofte la dialogoj estas tre longaj, sed ili neniam iĝas tedaj. Male, la ampleksaj dialogoj igas la tutan romanon facile legebla, malgraŭ ĝia dikeco.

En la rakonto aperas ne nur la eksteraj agoj kaj diroj de la personoj, sed ankaŭ la pensoj kaj sentoj, ĉefe de la kvin ĉefaj roluloj. Tamen plejparte

mankas la ekstera medio, en kiu situas la homoj. Post preskaŭ 600 paĝoj mi kvaŝaŭ konas tiujn personojn kaj iliajn interrilatojn, tamen kun malmultaj esceptoj mi ne vidas antaŭ mi la lokojn, kie ili vivis. Tre malofte Francis prezentas al ni la pejzaĝojn, la stratojn, la domojn, la ĉambrojn, la lumon, la sezonojn. La homoj pensas kaj sentas, sed ili malmulte sentas, perceptas. Nu, troviĝas kelkaj esceptoj. En la militfrontaj epizodoj de la unua mondmilito rolas la ruina kaj kratera pejzaĝo sulkita de tranĉeoj, kie oni konkeras kaj malkonkeras arbarojn kaj vilaĝojn jam videblajn nur sur la mapo.

La skeptika sinteno de pluraj ĉefroluloj al la milito estas baza temo de la verko. Eble ĝia plej kerna punkto estas pridemandado en tribunalo de 1940, kie la militrifuzanto Donald devas defendi sin antaŭ juĝantoj. Francis metis tiun vorto-duelon pri pacismo precize en la mezon de sia verko, kaj ŝajnas al mi, ke li ankaŭ intencis ĝin kiel pezocentron.

Alia trafa epizodo okazas sur Flandra batalkampo de la unua mondmilito. Tie ni spertas kiel Duncan, kiu atendante en la tranĉeo legas romanon de Jane Austen, perdas la libron dum atako, poste devas retreti kun siaj kamaradoj, kaj finfine, post nova turniĝo de la batalo revenas en la originan tranĉeon, dum centoj kaj miloj da homaj kadavroj kuŝas pelmele sur la ĉirkaŭa tero, kaj tie li retrovas sian libron.

La romano de Francis enhavas tiom da eroj bone traktitaj, ke ne eblas ĉion mencii. La rilaton inter Jano kaj lia fratino Laŭra li montras ĉefe per tre trafa dialogo inter ili. Bone prezentita estas la evoluo de la juna, ambicia Ina en edzino kaj patrino zorgeman kaj plendeman pri la senrespondeco de viroj. Menciindas ankaŭ la politikaj temoj, ekzemple la militsubteno de la socialdemokrataj partioj, kaj la militkritiko de la skota revoluciulo Maclean.

La stilo kaj lingvaĵo de Francis en ĉi tiu verko ĝenerale estas tre plaĉa kaj flua. Mi jam menciis la trafajn dialogojn, kiuj ankaŭ lingve plej ofte estas bonaj. La rakonta stilo estas bona, kutime trankvila, senurĝa. La vortelektado kaj frazarangado kutime estas bonaj, laŭ normala internacia stilo.

La romano de multaj jaroj estas elĉerpita en la libroservoj. Malfacilas kompreni, kial oni ne reeldonas ĝin. Pli ol aliaj verkoj ĝi meritus tion.

Sten Johansson

Nemeza: Traduko el Esperanto

La 27an de majo en la Moskva arta salono *Klasikuloj de la XXIa jarcento* estis prezentita la libro de Alfred Nobel *Nemeza*, eldonita paralele en Esperanto kaj en la rusa.

Nemeza estas tragedio en kvar aktoj, la eventoj okazas en Italio en la XVIa jarcento. La verko estis presita baldaŭ post la morto de Nobel nur 100-ekzemplere, kaj la tuta stoko estis neniigita laŭ postulo de la parencoj — probable pro ĝia akra kontraŭkatolikeco. Post cent jaroj estis hazarde retrovita unu ekzemplero.

El la sveda al Esperanto la teatraĵon tradukis Gunnar Gällmo. La libro aperis paralele en la sveda kaj Esperanto en Stokholmo en 2003. El la Esperanta traduko al la rusa lingvo ĝin tradukis Nikolaj Krjukov. La libro estas vere belaspekta, la eldonkvanto estas 3000 ekzempleroj. Tioman eldonkvanton Esperanto-libroj en Ruslando ne havis ekde la Sovetia tempo.

La tragedio estis tradukita el la sveda lingvo nur al Esperanto; el Esperanto, krom la rusa, ankaŭ en la slovakaj; onidire preparatas surscenigo en Bratislavo...

Dum la prezentado parolis la tradukinto, la redaktoro, anoj de la internacia centro *Nobelistiko*. Ĉeestis kultura ataŝeo el la Svedia ambasadejo. Laŭ peto de Krjukov mi rakontis pri Esperanto kaj ties literaturo, pri avantaĝoj de Esperanto por beletraj tradukoj.

Valentin Melnikov

Helpo al Esperanto-bibliotekoj

Por la 14a fojo Esperanto-bibliotekoj povas peti de UEA subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen.

La subvencioj estas celitaj al bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtato, urbo aŭ simila instanco. Subvencion oni ricevos kiel librojn laŭ la listo, kiu akompanis la peton. Pasintjare sep bibliotekoj ricevis librojn je la valoro de 115 ĝis 260 eŭroj.

Oni sendu priskribon pri la biblioteko kaj liston de dezirataj libroj laŭ ordo de prefero. Diskoj k.a. ne-libraj varoj ne estos konsiderataj. La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15a de oktobro papere (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ rete (direktoro@co.uea.org).

GK UEA

La triobla fiasko de Zamenhof

Homarane: Kajero en esperanto pri socio, filozofio, religio. Jaro 1, numero 1 / Redaktis Bertil Nilsson. — La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 2010. — 213 p.

Recenzante la libron *Granda galerio zamenhofa* (1973) de Adolf Holzhaus, Fernando de Diego jene esprimis sian embarason: sur p. 469 “troviĝas foto de la aŭtoro staranta apud blanka urso <...>. La foto estas ne malmulte amuza kaj per si mem valoras preskaŭ la duonon de la prezo de la libro, sed mi tute ne povas kapti, kion komunan ĝi havas kun Zamenhof... eĉ se la urso parolus esperanton!” (*Boletín*. 1975, №72, p. 22).

Similan impreson mi ricevis ĉe la lego de *Homarane*, nova frukto el la varieteo de la Civito, kies artikoloj apenaŭ rilatas al la Zamenhofa kimerio. La projekto hilelismo/homaranismo estas nenio alia ol obsedo de Zamenhof kiu, definitive kaj senrevene, apartenas al la historio. La juda historiisto Josef Meisl (1883–1958), bofilo de Saul Pinchas Rabinowitz (1845–1910), konato de Zamenhof el ties cionisma periodo, diras, ke li “estis ĉiam solulo, revulo kaj fantaziulo”, “apartulo!” kaj liajn ideojn nomas “klerula kimerio, fantazia revo de feliĉigisto de la mondo.” (Josef Meisl. *Der “Hillelist // Der Jude*. Berlin: 1917/18, №4, p. 274–276.)

Efektive, nek dum lia vivo nek poste liaj pseŭdoreligiaj ideoj trovis apogon. Eĉ pli ol la lingva reform-projekto de 1894 ili apartenas al la ruboj postlasitaj de la aŭtoro de Esperanto kaj atestas nur

tion, ke dum sia tuta vivo li balanciĝis kiel kano en vento. Ĉio dirinda pri ĉi temo jam diriĝis post la studoj de Cabel, Janton kaj Maimon. La historion de la Zamenhofa projekto detale kaj elĉerpe pritraktas Christer Kiselman en la recenzata volumo. Post ĝi oni povus meti dikan punkton fino-faran. La studoj de Kiselman kaj Janton kaj la kolekto de la koncernaj tekstoj (inkluzive de tiuj el 1914 ĝis nun preterentitaj) povus formi volumon por definitive fermi la ĉapitron.

Sed la bombastologio de la Civito, en sia karakteriza patoso, parolas pri “homaranistiko”, kaj “aplikata homaranismo”, kvazaŭ temus pri io reala kaj palpebla.

Tio validas aparte por la slango de Silfer: praraŭmismaj trajtoj, raŭmisma fenomeno, raŭma vojo... Per ĉi deliro Silfer intencas “enkasigi” historiajn figurojn de la Esperanto-movado kiujn li difinas “praraŭmistoj” (Zamenhof, Adam, Privat) kaj kiujn li prenas sub la Civitan mantelon laŭ la moto: “Nathan, Ihr seid ein Christ!” (Natan, vi estas kristano!).

Eĉ se oni provos tordi ŝnurojn el sablo, la asertataj paraleloj kaj modeloj ne ekzistas, nek kun Masaryk (C. Minnaja), nek kun Gandhi (H. Masson), nek kun Mazzini kaj Garibaldi (P. Penacchio) kaj des malpli kun Comenius kaj Obama (!!!) (J. Karhan).

Banet-Fornalowa, kiel ĉiam supraĵe babilema, simple rakontas stultaĵojn (p. 126–127) neniel kongruajn kun la faktoj prezentitaj de Kiselman (p. 50). Ŝi maĉas sen diri unu solan novaĵon.

Pro la neniigo de la privata biblioteko kaj arkivo de Zamenhof kaj de signifa parto de lia korespondo (precipe el la antaŭesperanta tempo, sed ankaŭ de la ricevitaj leteroj) multaj detaloj de lia vivo kaj pensado restos por ĉiam en mallumo. La esencan problemon formulis A. Künzli:

“Ĉar Zamenhof neniam referencis al io ajn, kion li legis, aŭ al io ajn grava aŭtoro <...>, ni ne scias, ĉu Zamenhof konis aŭ legis la programajn verkaĵojn de la menciitaj aktivuloj” [Pinsker, Sokolov, Herzl, Dubnov, Geiger]. (*Spegulo*, 2009. №4)


Efektive Zamenhof trioble fiaskis: lian hilelismen la sam-gentanoj apenaŭ priatentis, la homaranismen ignoris la esperantistoj, lian lingvon la mondo rifuzas.

Reinhard Haupenthal



KVAR NOVAJ LIBROJ DE “SEZONOJ”

Literatura Foiro, 2010, №244



En junio *Sezonoj* (Ruslando) kunlabore kun la Litova Esperanto-Asocio presigis en Kaŭno kvar novajn librojn.

Arthur Conan Doyle. *La ĉashundo de la Baskerviloj.* Tradukis el la angla William Auld. 2a eldono. 168 paĝoj. Serio *Mondliteraturo*; №6. Prezo: 15 eŭroj.

La ĉashundo de la Baskerviloj estas la plej fama krimromano en la mondo, konata en multaj lingvoj kaj en pluraj filmaj versioj. Danke al la traduko de William Auld Ŝerloko Holms kaj d-ro Watson ekparolis Esperante en 1998. Ĉar antaŭ kelkaj jaroj la unua eldono elĉerpiĝis, *Sezonoj* faris la duan eldonon.

Aleksander Korĵenkov. *Zamenhof.* 64 paĝoj. Serio *Scio*; №9. Prezo: 6 eŭroj.

Ĉi tiu biografia skizo baziĝas sur la materialo de la jam elĉerpita *Homarano* (2009) kun aldono de kelkaj novaj faktoj. Intertempe aperis ĝia angla versio.

Dek libroj / Kompilis Aleksander Korĵenkov. 32 paĝoj. Serio *Nia trezoro*; №1. Prezo: 4,5 eŭroj.

Prezento de libroj, kiuj grave influis la evoluon de Esperanto lingve, socie kaj kulture: *La Unua Libro*, *Fundamenta Krestomatio*, *Fundamento de Esperanto*, *Plena Vortaro de Esperanto*, *Parnasa Gvidlibro*, *Enciklopedio de Esperanto*, *Plena Gramatiko de Esperanto*, *Esperanta Antologio*, *Esperanto en Perspektivo*, *Plena verkaro de L.L. Zamenhof*. La tekstojn verkis Halina Gorecka, Reinhard Haupenthal, Aleksander Korĵenkov, Andreas Künzli, Carlo Minnaja.

Dek gazetoj / Kompilis Aleksander Korĵenkov. 32 paĝoj. Serio *Nia trezoro*; №2. Prezo: 4,5 eŭroj.

Prezento de la plej gravaj Esperanto-gazetoj: *La Esperantisto*, *Lingvo Internacia*, *Esperanto*, *La Revuo*, *La Ondo de Esperanto*, *Heroldo de Esperanto*, *Literatura Mondo*, *El Popola Ĉinio*, *Literatura Foiro*, *Monato*. Verkis István Ertl, Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov, Andreas Künzli, Stella Meester.

Mendu ĉe via kutima libroservo. En Ruslando, Litovio kaj Pollando oni povas rabatite aĉeti ĉi tiujn kaj aliajn librojn de *Sezonoj* — mendu ĉe nia [redakcia adreso](#).

Halina Gorecka

Ricevitaj libroj

Buzzati, Dino. *Sette piani*. Klag, Walter. *Hospitalo Sepetaĝa*. — Vieno: Klag, 2009. — 52 p., il. — [Donaco de Walter Klag].

Hauptenthal, Reinhard. *Die Wien-Aufenthalte von Lazar Markoviĉ Zamenhof (1859–1917) und seine ophthalmologischen Studien bei Ernst Fuchs (1851–1930)*. — Bad Bellingen: Edition Iltis, 2009. — 48 p. — (Schriften zur Esperantologie und Interlinguistik; Heft 15). — [Donaco de Reinhard Hauptenthal].

Malkovru Esperanton. Fascina Lingvo. Partizánske: E@I, 2009. — 23 p., il. — [Donaco de Peter Baláž].

Odkryj Esperanto. Fascynujący Język: [Pola versio] / Trad. el Esp. Czesław Żadziłko. Partizánske: E@I, 2009. — 23 p., il. — [Donaco de Peter Baláž].

Ricevitaj gazetoj

Dia Regno. 2010/2; Esperanto en Azio. 2010/67; Esperanto sub la Suda kruco. 2010/101; Esperanto. 2010/5; Femina. 2010/22; Frateco. 2010/88; Ĝenerala Informilo. 2010/161; Heroldo de Esperanto. 2010/4,6; Internaciisto. 2010/2; Juna Amiko. 2010/1; Kontakto. 2010/2; La Gazeto. 2010/148; La Merkato. 2010/99; La Movado. 2010/710,711; La Ondo de Esperanto. 2010/6; La Revuo Orienta. 2010/4,5; Le Monde de l'Espéranto. 2010/574; Literatura Foiro. 2010/244; Mikrofono. 2009/28, 2010/29; Norvega Esperantisto. 2010/2; Okazas. 2010/574; Spiritisma Esperanto-Informilo. 2010/139; Usona Esperantisto. 2010/2,3.

Originala literaturo: uverture la poemo *Miraĝo* de Lenke Szász, premiere la specimeno el la nova romano *Flugi kun kakatuoj* de Trevor Steele, poeziaj debutoj de du rumanaj lernantinoj, Daniela Ungurean kaj Petronela Hojbota.

Recenzoj: *Malgajaj sonetoj* de Malfrua Somero, *Lecionoj por knabo* de Mikaelo Bronŝtejn, *Marvirinstrato* de Tim Westover, *Malta nuntempa poezio* en traduko de Carmel Mallia, *Iluzio* de Ljubov Vondroušková en Esperanta traduko de Jaroslav Krolupper.

Franz-Georg Rössler prezentas la esperantistecon de Johano Strasser, prezidanto de la Germana PEN-Centro, kaj Márton Féjes — Esperantajn elementojn en la romano *Ploreganta simio* de la hungara verkisto Tibor Bálint. Julian Modest omaĝas al la poeto kaj tradukisto Nikola Stranĝanski, forpasinta pasintjare.

Monda literaturo: Ljubomir Trifonĉovski pri la teatraĵo *Duobla mensogo*, kie oni trovis spuron el la verkista genieceo de Shakespeare. Constantin Abaluta pri la virino en la klasika hajko (elfrancigis Koffi Gbeglo kaj Marie-France Conde Rey).

Giorgio Silfer enkondukas pri *Lingvopolitikoj en Esperantio* antaŭ la simpozio okazanta en Ĉaŭdefono venont-aŭguste. En *Sepa arto* Jordan Slavejkov pri la filmo *Rompitaj brakumoj* kaj ĝenerale pri la reĝisoro Pedro Almodóvar. Kaj daŭrigo de la nova rubriko *Kultura agendo*, lanĉita de la ĉefredaktoro en la pasinta numero: ĉi-foje pri ekspozicio en Vieno kun la partopreno de ducent artist(in)oj el la areo de la iama komunisma bloko — de la baltaj landoj ĝis la kaŭkaza regiono. Kaj paske kun Leen Deij: *La ĉielo super la ĉielo*.

HeKo

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Literatura konkurso Liro-2010

La Ondo de Esperanto denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso *Liro-2010*. Ĉi-jare estas proponitaj du originalaj kaj tri tradukaj branĉoj:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Traduko el la angla lingvo: *The man who lived for others* de Jerome K. Jerome
4. Traduko el la franca lingvo: *L'ami Joseph* de Guy de Maupassant.
5. Traduko el la rusa lingvo: *Amerikanec* de Arkadij Averĉenko.

En la originalaj branĉoj (1, 2) oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj, en la tradukaj branĉoj (3, 4, 5) — nur per unu verko.

La originaloj de la tradukendaj tekstoj estas elŝuteblaj en la retejo de *La Ondo de Esperanto*: <http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-liro.htm>

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1a de decembro 2010.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com.

Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizanto ĝis la 1a de januaro 2013 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Bonŝancon!

Halina Gorecka
sekretario de *Liro*

La redakcio de "La Ondo"
deziras al ĉiuj legantoj

**AGRABLAN
KONGRESAN
SEZONON!**



Pollando. 11–13 jun okazis la tradiciaj 26aj Esperantaj Tagoj de Krakovo kun interesaj ekskursoj, prelegoj, kulturaj prezentadoj (Jerzy Handzlik, Lidia Ligeza, Irena Urbańska kaj Lesław Lic, Jadwiga Gibczyńska, Jan Oberbek, koruso *Kamea* k.a.) kaj neevitebla foto en la Krakova ĉefplaco. (*Andrzej Sochacki*)



Italio. Grupo da esperantistaj naturamantoj kunvenis fine de majo por ĝui la karstan teritorion apud Triesto, promeni, flari la bonodoran flaŭron, admiri la panoramojn, gustumi la specialaĵojn de tiu ĉi parto de Italio ĉe la limo kun Slovenio, viziti interesan muzeon pri naturo. (*Edvige Ackermann*)



Germanio. Małgosia Komarnicka, kies intervjuo kun la urbestro de Herzberg am Harz, Gerhard Walter, aperis en la junia *Ondo*, transdonis al li kelkajn numerojn de la revuo. La urbestro estis tre kontenta pri la revuo kaj pri la mencioj de la urbo en ĝi. Li salutas niajn legantojn kaj invitas ilin al la Esperanto-urbo.



Pro la foto "Korteto en Montenegro" Vladimir Merkulov ricevis la trian premion en la 12a Internacia Fotokonkurso de "La Ondo de Esperanto".